

La Rondo

The Australian Esperanto Monthly

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Jarkotizo: 12½\$ (aŭ 20 respondkuponoj).

Anoncoj: Tri linioj: 4\$.



Redaktoro: F. R. BANHAM, 2 Banchory St., Essendon, W.5, Victoria.

Adreso de A.E.A.—Box 2122T, P.O., Elizabeth Street, Melbourne.

Kasisto: K. Linton, 11 Poplar Street, South Caulfield, S.E.8.

Vol. 12, N-ro 75.

MELBURNO.

Jan.-Feb., 1957.

SCIENCE, ART, PHETORIC, LITERATURE

Esperanto Fittingly Serves in ALL These Fields.

In "Languages in The New Europe" (2nd Edn., 1928, p. 281), Prof. Meillet writes: "Literature is the last of the uses for which an artificial language can be usefully employed . . . (It) is a fitting instrument for the reporting of facts and ideas which are free from the more delicate nuances, but it is, by its nature, incapable of literary expression."

Prof. Gaston Waringhien in his "Essays" (1) convincingly refutes this contention. Meillet's text, he says, presents a warning to all scientists, for it shows the danger even for the greatest, of speaking of something they have not sufficiently studied. Meillet, be it noted, grants to an artificial language the fields of everyday life, of politics, technics and science. But surely if an artificial language can clearly convey ideas on politics, technics and science, and provide exact redaction of contracts, reports and reviews, it does this by virtue of the definiteness of its roots, the richness of its word-building, and the precision and flexibility of its syntax. These qualities are identical with those which make up the literary worth of the natural languages. What was the "Discourse" of Descartes if not a scientific report? What was the "Provincial Letters" of Pascal if not a religio-political pamphlet? Yet those two books form the basis of French literary prose.

The "Decameron" is, in a real sense, a report on the everyday life of Renaissance Italy. And it is the basis of Italian literary prose.

If Meillet had given thought to these facts and taken the trouble to read, say, the Congress speeches of Zamenhof he possibly would have delivered a different judgment.

It is not, however, necessary to appeal to history and esthetics. A little logic is enough. For, among the sciences one may suppose that Meillet reckoned linguistics with all its branches—semantics, philology, exegesis and so on. He thus acknowledged that, on this ground also, an artificial language can facilitate the common task of scholars of all nations.

True it is that linguists need an international language less than do doctors and chemists, because their task is to explore the national languages. But they cannot learn all of them. Romance-language specialists as a rule know little of Slavic tongues, or non-European, yet more remote from their special field. Language scientists would profit from the general use of Esperanto.

Is it really possible to deal with specific language problems, for example the synonyms of a Greek or Hebrew word, the stylistic usage of the passive in Latin or English, the form-expressions of Plato or Paul, using an international language which could not express the "too delicate

nuances" of a literary text? Is it possible to publish critical editions of the most important classical works of all languages—which will be one of the chief tasks for the Esperantist erudites of the future—without providing for their notes, comments and even translations in the international language? How could a language incapable of literary expression reproduce the eloquent or poetic effect of a turn of speech by Isaiah or Tacitus, or demonstrate this or that preference of variants in a Persian poem?

Meillet, we assume, has granted, under the heading of science, these fields, no less, to what he deems the limited capability of an artificial language.

The truth is that any language, however primitive, not only serves the everyday needs of its users, but sooner or later is given literary expression. Villon in his ballads used the slang of medieval thieves. Esperanto, which is neither crude nor primitive, has proved itself in belles-lettres and in classical translations of remarkable fidelity.

There is no clear line drawn between the scientific and the literary language. A medium perfectly fitted for reporting "facts and ideas" is *per se* fitted to convey the "delicate nuances", the subtle implications, inherent in them.

Esperanto has proved itself capable of doing this to a degree that would amaze its critics would they but learn it and use it. Their first serious reading book might well be the remarkable volume on which this article is based.

(i) "ESEJOJ" de Gaston Waringhien; published by Stafeto, Tenerife, Canary Islands. 228 pp. The first of two volumes wholly in Esperanto.

NEKROLOGO.

En Novembro 9, 1956, S-ro Brendon Clark, de Dargaville. Li estis Ĉef-del. de U.E.A. por Nov-Zelando ankaŭ je la tempo de sia morto. En la E-a literaturo proza kaj precipe poezia, li estis elstara verkanto. Detaloj en posta "New Zealand E-ist".

Australia Kroniko

● MELBOURNE: Pli ol 50 gesanoj kunvenis je la 15a Dec. en la klubejo de "Caris Club" por festi la tagon de la "Majstro". Post enkondukaj vortoj de s-ro E. McKenzie, s-ro Koppel deklamis E-poemojn; kiel festparolanton ni elektis ĉi-jare la plej bonan oratoron en Esperantujo. Certe, persone li ne povis veni, sed sur diskoj ni audis lian bonegan paroladon "La Kultura Valoro de Esperanto". S-ro Drummond prezentis la Pyke Memorigan Premion, kiun gajnis, post multaj jaroj, Melburnano: s-ro Stan Tighe, kiu studis E-on en la kurso de s-ino Fay Koppel.

Dum la Olimpiaj Ludoj ni konstatis kun granda ĝojo ke la reprezentanto de Pollando en la Internacia Olimpia Komitato estas E-isto. Profesoro D-ro Jerzy Loth kontaktis nin kaj alparolis la klubon je 5a Dec. Li persone konis D-ron Zamenhof. Post li, alia vizitanto, s-ro Volo Gueltling (Sydney) montris belajn kolorajn lumbildojn. Aliaj bonvenaj vizitantoj dum la Olimpiaj Ludoj estis s-ro N. Gamble kaj s-ino J. Torr el Canberra.

En la nova studjaro ni havas 3 studgrupojn. S-ro Drummond gvidas komencantojn, D-ro Williams iomprogresintojn kaj s-ino Koppel progresintojn. Ni bonvenigis novan enmigranton al Melburno, f-ino Rita van Rijswijk, kiu estis tre aktiva membro en la F.L.E.-organizo en Amsterdam. Pri sukcesplena propagandvizito al Hobarto (vidu aliloke) raportis D-ro Williams en la kunveno de la 16a Jan. Samvespere nia germana amiko Herrmann rakontis pri vizito al Sydney kaj la tieaj s-anoj. Je 23a Jan. ni prezentis magnetofonan sonbendon ricevitan de la Esperanto-Klubo en Uppsala (Svedujo) El la bona programo elstaris prelego de universitata profesoro d-ro Soederberg kaj svedaj popolkantoj.

Survoje de Nov-Zelando al la Universala Kongreso paŭzis en Melburno malnova E-isto s-ano W. H. King (Christchurch), kiu cetere estis prezidanto de la austral-azia E-Kongreso en Melburno 1925: Je 6a Feb. li rakontis pri la novzelanda E-movado

kaj pri N.Z. generale, kaj je 20a Feb-
li montris al ni belajn kolorbildojn
pri Nov-Zelando. Dum lia Melburna
restado niaj fervoraj ges-anoj Mil-
ligan estis liaj gastigantoj.

En la novembra Rendevo s-ro
Nolan (Dunedin) rakontis pri Maori-
oj kaj poste prezentis sur sonbendo
paroladojn de elstaraj britaj E-istoj
(s-roj Gething, Holmes, Leslie kaj
D-ro Lapenna). En januaro s-ro A.
Fridenbergs parolis pri la temo "Es-
peranto venkos en decida hor'." Li
diris ke la naciismo de la nuntempo
ne nur multe malhelpas al Esperanto,
sed ĉe kreas pli da lingvoj; kiel ek-
zemploj li citis la kreadon de "hindi"
en Hindujo kaj de la novhebrea ling-
vo en Izraelo. Li finis per la opti-
mista dirajo ke post la tempo de
naciismoj venos "la decida hor'" en
kiu venkos E-o. (Ĉu?, la pesimistoj
inter ni demandas sin).

● **SYDNEY:** Dum la jaro agado
en Sidnejo daŭris, sed ni ne povas
raporti mondskuantaĵojn. La plej
esperinda okazintaĵo estis la propa-
gando por Esperanto en la Paca
Kunveno (Assembly for Peace),
kiun faris ges-anoj Mueller-Sorau,
Hartman kaj Barlow. Ili estis sub-
tenataj de s-ano Oki, kiu ankaŭ
vizitis la Kunvenon kaj helpis niajn
representantojn laŭbezone. En la
fina raporto aperis vortoj pri nia
lingvo kaj la laboro de ĝi farata por
mondpaco. Dum la diskutoj niaj re-
presentantoj parolis ofte kaj laŭte pri
la Internacia Lingvo kaj kelkaj ĉes-
tantaĵo eliris, promesinte lerni la ling-
von en la propraj urboj.

S-ano Mueller-Sorau faris kelkajn
prelegojn en diversaj organizoj kaj
ĉiam vekis intereson.

La Junulara Grupo daŭrigis stud-
adon dum la tuta jaro, malgraŭ mal-
sano de la instruistino, s-ino Grace
Barlow. Ankoraŭ restas dek aktivaj
membroj, kiuj nun parolas kaj skribas
sufiĉe bone. Ni ankaŭ sendis ĉirkaŭ
50 verketojn al Japanio por la "In-
fanoj de la Mondo" projekto.—G.B.

Nia Zamenhofa Vespero okazis je
la 15a de Dec. Post malfermaj vortoj
de la Prezidanto sorĉisto montris
kelkajn artifikajojn. Kvin knabinoj
el la kurso de s-ino Barlow prezentis
amuzan skeĉon el la plumo de s-ino
Barlow. Por plenigi la paŭzojn inter
la aranĝoj nia germana amiko Her-

mann (el Melburno) kantis german-
ajn popolokantojn kaj akompanis sin
per gitaro.

F-ino Ursula Walde translokiĝis el
Mittagong al Sydney kaj edziĝis en
Decembro. Ni esperas ke kiel s-ino
Goessling ŝi tre aktive partoprenos
niajn kunvenojn.—Volo.

● **BRISBANE: GEEDZIGO:** La
25an de Aŭgusto 1956 en Buderim
Mountain, Queensland, geedziĝis
Gloria Heather Nonmus kaj George
Alan Grant.

VIZITANTO: La 5an de Decem-
bro vizitis Brisbanon S-ro G. Schikor-
sky, samideano el Hamburgo. La
UEA Delegito aranĝis interkonan
vesperon kaj kelkaj anoj ĉe-estis por
saluti la vojaĝanton.

ZAMENHOFA FESTO: Elstare
plensukcesa Festo havis lokon ĉe
S-ino V. Fraser, Clayfield, kie kun-
venis dudek personoj kiuj ĝuis bonan
programon kaj bonan vespermanĝon.
La societanoj bonvenigis en nian
rondon nove-alvenintan samideanon el
Aŭstrujo, S-ro J. Matzer, kiu nun
loĝas en Brisbano. S-ro Matzner
kunportis serion da belegaj lumbildoj
pri Aŭstrujo, kaj S-ro H. N. Love
funkciigis aparaton por montri ilin
al la anoj. Tre notinda estas la
nombro de Esperantistoj inter la
gastoj. El dudek personoj, dekseks
estas Esperantistoj, kaj la tutan ves-
peron ili parolis nian lingvon ! !

● **PERTH:** La Generala Kunveno
de la Ligo okazis kaj la novaj ofiĉis-
toj estas jene: Prezidanto, S-ino G.
Pollard; Vic-Prezidanto, S-ino R.
McGrath, D.B.E.A., N.E.D.; Sekre-
tario, S-ro T. Cameron; Kasisto,
F-ino A. Longson; Ekzam-Kontrol-
isto, F-ino O. Stempel, D.B.E.A.;
Bibliotekisto, S-ino A. B. Sedgley,
D.B.E.A., N.E.D. Gratulon al la
nova komitato!

En la ekzamenoj, ni havis 4 par-
toprenantojn por la Premio Pyke,
kaj en niaj propraj ekzamenoj la
jenaj gajnis premiojn: 2 en la Tria-
grada; 2 en la Duagrada, kaj 6 en la
Unuagrada. Plaĉas al ni raporti, ke
8 personoj partoprenis la Premion
Masel. S-ro P. E. Schwerin gajnis
le premion por 1956. Gratulon al li!

Ĉe la Zamenhofa Festo, sabato, 15a Dec., 30 anoj ĝuis bonan ĉefmanĝon ĉe The Wattle Restoracio. Poste, anoj kaj amikoj iris al la Women's Service Guild en West Perth por societa kunveno. Nia nova prez-o, S-no Pollard, paroladis; kaj ni aŭdis kelkajn bonajn muzikistojn. Sed la plej grava afero de la vespero estis, kaj la filmo "Danlando" ĵus alvenis, kaj tre plaĉis al ni vidi ĝin. Dankon ankaŭ al la amiko, kiu pruntedonis sian maŝinon por prezenti la bonegan filmon.

Nia pasinta prez-o, S-ro Jack Hawks, estas eksterlande, libertempante dum 10 monatoj.

Vespere, 28a Jan., Ge-sroj McGrath afable pruntedonis sian hejmon por la adiaŭa kunveno honore al S-ro Hawks. Ĉ. 30 homoj ĝuis agrablajn vesperon kun kelkaj malnovaj amikoj de la movado en Perth.

Vespere, 3a Feb., ĉ. 20 amikoj diris "bonan vojaĝon" al S-ro Hawks, kiam li foriris per trajne por Sidnejo kaj Brisbano. El Brisbano li vojaĝos an la ŝipo "New Holland", 5a Marto, por Eŭropo, vidonte Singaporon, Hong Kong, Japanujon kaj Kanadon. Li estos nia reprezentanto en la Kongreso ĉe Marseilles kaj ni esperas revidi lin je Kristnasko.

ADRESA SANGO. — La Liga adreso nun estas: Room 6, 196 Adelaide Terrace, Perth. Bv. sendu leterojn al la sekretario ĉe: 57 Rupert Street, Subiaco. La Ligo ankoraŭ kunvenas la 2an kaj 4an jaŭdon en la monato.

● **ALBURY:** Dum la longa semajnfino de la "Aŭstralia Tago" (26-28a Jan.) okazis en Albury E-ista Renkontiĝo, pro kiu ni ŝuldas grandan dankon al la loka delegito s-ano F. V. Taylor, kies gastoj estis la gesanoj el Canberra kaj Melbourne; ankaŭ s-ano I. Maddern el Wodonga partoprenis.

Sabat- kaj dimanĉvespere s-ano Taylor, kiu ĵus revenis de la Univ. E-Kongreso en Kopenhago, montris al ni centojn da belegaj kolor-lumbildoj pri la kongreso mem, la E-ista Somerlernejo en Helsingoer kaj pri liaj migradoj tra Svislando, Germanujo kaj Britujo. Krome ni aŭskultis

al prelego de D-ro Ivo Lapenna (sur diskoj) pri la "Kultura Valoro de E-o.". Ambaŭfoje s-ino Taylor regalis nin per bongusta nokto-manĝo kaj estis ĉiam noktomezo kiam ni reiris al niaj hoteloj.

En la belega Botanika Gardeno de Albury okazis dimanĉmatene vigla diskuto pri la eldono de la "Aŭstralia Antologio". (Denove ni petas niajn membrojn kontakti s-ron N. Gamble, 27 Froggatt St., Canberra, kiu informos vin kiamaniere vi povos helpi en ĉi-tiu projekto, aŭ per tradukoj aŭ per mon-pruntado!)

Posttagmeze, per aŭtomobiloj ni unue vizitis la Bonegilla Enmigradan Tendaron, sed la eŭropaj E-istoj, kiujn ni deziris viziti, estis bedaŭrinde jam for. Ni daŭrigis la vojaĝon al la majesta Hume Digo kaj Akvorezervejo.

Denove dankon al s-ano Taylor per kies gastameco ni ĝuis belan libertempon inter ge-sanoj. Pri la renkontiĝo aperis detalaj raportoj en "Canberra Times" kaj en la du germanlingvaj ĵurnaloj "Neue Welt" (Melbourne) kaj "Der Anker" (Sydney).

● **HOBART:** Estas kun granda ĝojo ke ni povas raportiti pri nova esp-ista vivo en Hobarto. Pro bonega antaŭlaboro de gesanoj M. Leereveld, okazis je 27a Dec. en ties hejmo (41 New Town Rd., Hobart) la fondkunveno, kiun partoprenis proks. 20 personoj. Ĉefparolanto de la vespero estis A.E.A.-Prezidanto, D-ro Fred Williams, kies vizito al Hobarto estis bona propagando por nia movado. Interalie, Radio-Stacio 7ZR intervjuis lin kaj detala raporto ankaŭ aperis en la loka gazeto "The Mercury".

La fondkunveno akceptis la nomon "Hobart Esperanto Group" kaj elektis la sekvantajn oficistojn: Prezidanto: s-ro Marcel Leereveld; Sekretario: s-ro George E. Lancaster; Kasisto: S-ro E. K. Morris. Dek du Klubanoj jam aliĝis al A.E.A. (bona ekzemplo al pli grandaj kaj malnovaj E-kluboĵ!!)

La nova Hobarta E-Grupo deziras aĉeti uzitajn E-librojn. Informu: S-no G. E. Lancaster, c/o The Friends' Junior School, Hobart,

AL LA UNIVERSALA KONGRESO.

Feliĉa Finiĝo.

"Longe antaŭ nun", kiel komenĉigas la fabeloj, mi ricevis poŝtkarton en E-o de knabo en Sonderborg, Sud-Danlando, kaj, per mia respondo, ekestis amikeco, kiu daŭris dum 24 jaroj. Grandan plezuron mi sentis, kiam, en Aŭgusto, 1956, mi efektive renkontiĝis kun la "knabo" Heinrich Becker, en lia hejmo en Sonderborg kaj ĝuis la kuneston de lia edzino, Aase, kaj geinfanoj Kjeld, Julla kaj Mikael. Tiel feliĉe finiĝas la fabelo.

Kvar ĉarmaj Filinoj.

Komence de nia vojaĝo, mia E-ista edzino kaj mi foriris de Aŭstralio per Itala ŝipo Oceania, en Aprilo lasta. En Djakarta ni atingis la domon de la UEA-delegitino post amuza rajdo en trirada veturilo "peca", pedalita de Indoneziano. En Italujo ni vizitis kelkajn tre afablajn UEA-delegitojn kaj grupanojn en Roma, Firenze kaj Genova. En la hejmo de S-ro Minnaia, Roma, ni amikiĝis kun Italaj, Usonaj kaj Japanaj samoj, kaj, en alia hejmo, pasigis ĝojigan horon kun la kvar ĉarmaj filinoj kaj edzino de S-ro Fresco.

Ni vojaĝis tra Svislando ĝis Germanujo kaj renkontiĝis kun nia filino Doroteo, studento en muzik-kolegio en Freiburg. Post du monatoj ni denove renkontiĝis kun la filino ĉe la E-festoj en Danlando kaj poste en Londono.

Severa Kongreso.

En Kopenhago la Universala Kongreso konvinkis nin, ke E-o estas vere praktika solvo de lingvaj malfaciloj—sed Kongreso eble tro granda, aferplena kaj preciza por esti alloga al nura provincano. Ĉu, en la kunvenoj, la estroj devas paroladi tiel rapide kvazaŭ fanfaroni pri sia lerta posedo de la lingvo?

Akurate je fiksita horo la pordo de ĉiu kunvenejo fermiĝis. Malfruiĝintoj je du-tri minutoj sin trovis eksterenŝlositaj ĉe se okazas vizito al fabriko, radistacio k.t.p. Ĉagrene, ĉar estas malfacile esti akurata en multafera, fremda urbejo.

Gaja Lernejo.

Aliflanke, ni tre ĝuis nian estadon ĉe la pli intimaj kursoj de la internacia alturnejo en Helsingor (Elsin-

ore) la urbo de Hamlet. Ni tri Aŭstralianoj manĝis, lernis kaj intermiksitis kun 220 sam-oj el preskaŭ ĉiu parto de Eŭropo. La sekretario, S-ro Friis, kaj instruistoj S-ino K. Zacho kaj S-ro T. Morariu, kaj aliaj, estis ĉiam agrablaj kaj helpemaj. Ni iĝis granda, rondo familio parolanta E-on. Neforgesebla semajno de plezura intermiksado de kursoj antaŭtag-meze, distrado poste.



En la Internaciaj Esperanto-kursoj en Helsingor, Danlando, 28a Julio ĝis 4a Aŭgusto, 1956. Instruisto de Cemetodo, Tiberiu Morariu, el Svedujo, kaj lernantino Dorothy Taylor, el Albury, Aŭstralio.

Bela Britujo.

En Britujo, interparolante kun aliaj gastoj, ni promenadis multajn mejlojn en bela verda kamparo, laŭlonge de heĝoj, tra arbetaroj kaj sur montetoj. Mi forte rekomendas la gastodomojn de du Britaj societoj—The Holiday Fellowship kaj la Co-operative Holidays Assocn.—lokitaj en la plej belaj distriktoj de Grand-Britujo.

Mia valizo enhavis malgrandan projekciilon kaj aron de koloraj diapozitivaj (Kodachrome) pri Albury. Mi elmontris la bildojn ĉie. Dua universala lingvo.—Frank Taylor.

KRIO EL HUNGARUJO!

D-ro Kalocsay Kalman, Budapest 8, Maria utca 34; Kokeny Lajos, Budapest 5, Balassi Balint utca 25, k.a. dolore vokas helpon mone kaj materiale por la trafitoj en la tumulto. Kontakto ilin per flugletero.

Recenzoj

KANDID, ZADIG, SENARTIFIKULO, Volter, en la trad. de Lanti. 312 p. 2.30 dol. Eld. S.A.T., 67 Av. Gambetta, Paris 20.

Lanti estis temperamente kaj stildote destinita kiel taŭge trafa tradukanto de la Franca satiristo. Pesimisma, ironia, moke mordema, dum sia polemikoplana vivo li forĝis al si ilon de skribesprimoj, kiu bele servis por revesti la kameecajn paĝojn de lia fama samlandano. Estis granda fortostreco, traduki kun egala boneco la tri rakontojn, konservante iliajn apartajn stilvalorojn kaj spritan aromon. Povis fari ĝin nur homo, kiu plene posedis kapablon virtuozi en ambaŭ lingvoj.

Lanti konscie kaj celkonforme akceptis Esperanton, vivis en ĝi kaj per ĝi, ĝis fine la lingvo fariĝis la psika medio en kiu funkciis lia senripoza intelekto kaj sekva sinesprimado.

En 1775 okazis la tertremo ĉe Lisabono. Ĝi forte frapis la spiriton de Volter. Ĉiam li abomenis la Optimismon, kiu, nebullingve defendate de Lajbniĉ, asertis, ke ĉio estas ne-rareble prava. Pope poemis:

Unu vero estas klara—
Ĉio estas sennera.

Volter atakis la optimismon per Kandid, verko en kiu oni vidas, ke sub la supra, facila mokemo kuŝas plej profunda sento pri la senhela stato de l'homoj kaj plej vigla simpatio kun iliaj doloroj. Lia fakta vivo estis riĉa je honorindaj bonfaroj al kruele traktataj viktimoj; li helpis ilin spite gravan personan riskon.

Fruo oni rigardis Kandid nur rakonto aventura, sed poste ĝi estis rekonita kiel lia plej trafleta verko de l'didakto. Ĝia stilo cetere estas mirinde majstra en sia elektita esprimmedio.

Zadig estas orienteca rakonto de la tipo Mil kaj Unu Noktoj, kaj Volter kreis en ĝi gemojn de satiro, saĝo kaj sprito. La stulto de la homaro, la difektoj de la socio kaj registaroj, unu post aliaj fariĝas temoj por milda rikano prefere ol kruda denunco.

Senartifikulo (L'Ingenu) ŝajne fontis el la disputo inter Jezuitoj kaj Jansenistoj; pri tio, legu la Leterojn Provincian de Pascal, se ili havas la

necesan paciencon. Senartifikulo havas sentan similecon kun La Insulo de l'Pingvenoj (Anatole France), kaj legantoj anime orientitaj al tiu ĉi legos tiun de Volter kun aparta simpatio.

—F.R.B.

"LA REVOLUCIO DE ĈINIO"
de Hanna Kobylinski, trad. el la Dana de C. Graversen. Eld. S.A.T. 94 p. 5/- Aust.

Ĉi tiu bona traduko donas skizon de la malnova ĉina socio, kaj priskribas la eventojn de 1840 ĝis 1954, analizante la procezon de la tri revolucioj de Sun Jat-sen (respubliko); Ĉiang Kai-ĉek (unueca registaro); kaj Mao Ce-tung (tutkomunisma).

Aparte valoraj estas ĉapitroj pri la internaj cirkonstancoj de la Popola Respubliko kaj ĝia sinteno al la ĉetera mondo.

Interese estas: proks. 12% el la tutnaciaj deputitoj estas virinoj (147 el 1226); en Ĉinio estas 130 aŭtonomaj malplimultoj, laŭgrade variaj de la vasta Interna Mongolio ĝis la eta Yaoregiono, de nur 18,000 loĝantoj; ĉiu entrepreno, ĉu ŝtata, ĉu privata, pagas 3% el la salajrosumo al la sindikataj kasoj por laboristasekuro, Viroj pli ol 60-jaraj post 25 laborjaroj, kaj virinoj pli ol 50-jaraj post 20 laborjaroj, ricevas pension de 50-75% el la salajrosumo.

La tono de la aŭtoro estas racie modera—ne emocie tropartieca. Li taksas la socian kaj ekonomian staton per menso bone ekvilibrita, kaj zorge esploras la statistikon. Liaj komentoj pri la nekonsekvenco de la eksterlanda politiko rilate Ĉinion ricevas vastan aprobon de pri-Ĉiniaj studentoj.

"UNIVERSALA RELIGIO",
Poŝtkesto C.C. 142, Suc. 13b, Buenos Aires, Argentine. Tiu organizo adoptis E-on kiel ilon por alilandaj rilatoj.

BAHAA KREDO. Petu materialon de R.U. Orloff, 31 Nahanton Str., Newton Centre 59, Mass., USA. Aprobe preparolis Bahaismon i.a. Leo Tolstoj, Prezidanto Masaryk, Pastro T. K. Cheyne, Prof-o Benj. Jowett, Prez. Benes.

Interesatoj nepre skribu al tiuj adresoj, por kuragiĝi nian aferon, kaj preni al si simpatian lezaion.

FROM THE PRESIDENT.

Nearly twelve months have passed since I became your president and it is time to give an account of my stewardship. During the year I have been teaching Esperanto at the Melbourne Esp. Club. I continued my study of the language and recently gained a diploma at the Pyke Memorial Examination. This extra knowledge and experience will help me in future teaching.

May I urge as many of you as possible to improve or refresh your knowledge of Esperanto by preparing for one or other of the examinations available?

I have continued to assist in the other activities of the Melbourne Esp. Club, and I addressed several outside bodies on the subject of Esperanto.

Apart from co-operation with other officers and committee members of the A.E.A., it has been a special concern of mine to try to help the movement in areas where it was weak.

Recently it was my great joy to be present at the home of our good friends Alido kaj Marcel Leereveld, when some of our splendid veterans of the Tasmanian Esperanto Association joined with younger enthusiasts in the launching of the Hobart Esperanto Group.

While assisting your local class or group, remember to support the A.E.A. and "La Rondo" financially as well as by supplying news.

The Universal Esperanto Assn. is doing its best to link up E-ists internationally. Be sure to support it, as well as any specialist bodies in which you may be interested.

—FRED WILLIAMS,
President of A.E.A.

SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA celas uzi Esperanton por la pliboniĝo de la socia stato. En ĝi ariĝis tiuj E-istoj, kiujn ĉagrenas la interbatalado "paca" aŭ milita inter homoj, grupoj kaj landoj., kaj kiuj vidas la solvon el tiu batalo en la ŝanĝo de la nuna ekonomia sistemo ĉie konkurenca. Ekzistas diversaj opinioj pri la maniero akiri ĝin. — Tiuj tendencoj tamen kunla-

boras en unu asocio, S.A.T., kaj klopodas tolereme kaj saĝe lerni, ĵugi kaj estimi la ideojn de aliuloj kaj klarigi siajn.

La rezulto estas pli bona interkompreno kaj malpli da fanatiko; instrua interŝanĝo de ideoj kaj idealoj, kiuj plifortigas kaj pligustigas per pense prova komparado.

Se vi deziras partopreni en tiu universala prisocia ideosanĝado kaj kunlabori por krei pli justan, pli pacan kunvivadon, petu informojn: M. Leereveld, 41 New Town Road, Hobart, Tasmania.

En "New Zealand E-ist" (Nov.-Dec.) represe troviĝas artikolo "The Classics in Relation to E-o", kiu aperis en "La Rondo" (Okt.-Dec., 1954).

EN LETERO

Ni ricevis riproĉon pri neaperigo de ampleksa bilanco de la Kanbera Kongreso. La letero ne venis de Kanbero. Mi klarigu la aferon:

Konsiligiĝinte kun komitatano de AEA, mi ricevis aprobon ne presigi ĝin pro evidentaj motivoj — ekstra kosto kaj uzo de plena pago en gazeteto, kiu aperas nur du-trimonate. Laŭ mia sperto dum 25 jaroj da redaktado, mi trovis, ke nur tre malmultaj legantoj neaprobis tiun ellason. Interesatoj facile ricevas kopion el la centro.

La ellaso de la balanco estis tie kaj tie tamen rigardata kiel ago de indiferento al la bonaj kongres-agantoj, kiuj tiel malavare subtenis al nia gazeta kaso per la profito ĉe Kanbero.

Mi presigas ĉian raporton ricevitajn de mi. Estas homoj, kies tasko estas: redakti la presotajn raportojn kaj sendi ilin al mi. Formalan dankesprimon de ili mi ne ricevis. Tamen mi persone honoras la donacintojn sincere kaj danke, nur bedaŭrante, ke faro, decidita pro la intereso de ĉiuj legantoj, ricevis malveran interpreton.

La tono de iu plendo certe pli proksimiĝas al la E-a spirito se mankus al ĝi vinagraj aludoj kaj ironiaj rimarkoj. En atmosfero generita de tia animstato ni vane bedaŭras "la nunan stagnon" en E-o.—Red.

PIPAJ PAROLOJ.

"Laŭ lingvo kaj enhavo La Rondo estas metota nepre inter la unuajn." —Ota Ginz, Shd. H. Szold 11, Kirjat Jam Bet, Israelo.

Pri Mussolini: "Lia tielnomita sciado de fremdaj lingvoj estis fantazie troigita. Mi neniam aŭdis lin voĉi pli ol du vortojn en la Angla; li certe ne estis kompetenta pri ĝi. Povis esti, ke li facile legis la Francan; mi opinias, ke jes. Lia scio de la Germana estis tiu de lerneja bubo." —D-ro H. M. Moran, "In My Fashion", 1946.

"La romanoj de Victor Hugo estas malsuperaj ol tiuj de Balzac, Sand, kaj de Dumas." —Harold Nicholson en "Encyclopedia Britannica."

"700 Esp-istoj ambaŭseksaj partoprenis . . ." ("Joseph Rhodes," p. 7). Ili do estis hermafroditaj?

"Oni provu konvinki la novan generacion E-istan pri tio, ke nia lingvo entenas latente trezorojn, kiujn Zamenhof mem ne povis elfosi." —Lanti.

"Postulas almenaŭ monato, por la presisto prepari numeron de La Rondo . . . de la tempo en kiu ni donas al li la presotajon ĝis la horo en kiu la finfarita gazeto estas jam preta por ricevo ĉe lia oficejo." —Red.

"Kiom da signifeco necesas por fari epokon? Laŭ niaj fervoraj recenzantoj nur la eldono de iu plimalpli grava Esperanta libro. En 'British Esp-ist' unu plumulo du fojojn uzis 'epokfara' por signi le eldonon de certa poemo. 'Franca E-isto' nomas alian verkon 'epokfaranta' —nur du ekzemploj el multaj, kiuj salutas la venon de 'epokoj'. Estus interese, scii kiom da epokoj naskiĝis de post ĉirkaŭ 1900, kiam la E-aj librotaksantoj komencis serĉi sufiĉe imponajn epitetojn." —Farbo.

PYKE MEMORIAL EXAMINATION.

Nine entered. The prize was won by Mr. Stan Tighe; certificates were awarded Dr. F. Williams, Mrs. V. Baker, Miss G. Glendinning, and Mr. Wolo Gueltling.

The next examination is set for next November, and students intending to sit for the prize of £5/5/- should now be thumbing their textbooks. Anyone may compete for the

certificate, which, of course, is also given to the prize-winner.

NI DANKAS!

Ĉar la donacinto deziras resti anonima, ni ne povas menciigi lian nomon, sed ni elkore dankas lin pro lia malavara donaco de £5 al la ĉiam bezonanta kaso de A.E.A.

ZAMENHOF KAJ VOLAPUK.

Amiko skribis: "Zamenhof havis antaŭ li la ekzemplon de Volapuk (dum lia laborado super E-o)". Li eraras. Diris Z. (Originala Verkaro, 263): "Kiam mi komencis mian laboron, tiam Volapuk ankoraŭ ne estis en la mondo . . . Kiam la plej granda parto de mia laboro estis jam finita, tiam sur la sceno venis Volapuk . . . Kiam mia laboro jam estis finita . . . Volapuk rapide faris progresojn."

SIR E. DENISON ROSS

in a broadcast in 1931 ("Both Ends of the Candle") allowed to Esperanto "very great advantages". He thought it might be "of great value for scholars (compare Meillet, p. 161.—Ed.) and scientists" and would "encourage its use for learned publications". He did not, however, believe that men would ever come to think in an artificial language.

Any early doubts this great Orientalist may have had on this score vanished after he had visited the World Esperanto Congress in London in 1938. To him thereafter it was indeed "a living language" ("British Esperantist," Dec., 1940.)

EDUCATIONAL RESEARCH.

For the conference of the Modern Language Assn. of America on "constructed languages" in New York, April, 1956, Dr. W. Solzbacher and Miss V. Nixon supplied information on British publications. In their list they mentioned: "Also: frequent articles and news items in . . . La Rondo, Australian Esperanto monthly, Melbourne". We are glad to have been of some small service in this field of bibliography.

La Rondo

The Australian Esperanto Monthly

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Jarkotizo: 12½\$ (aŭ 20 respondkuponoj).

Anoncoj: Tri linioj: 48.



Redaktoro: F. R. BANHAM, 2 Banchory St., Essendon, W.5, Victoria.

Adreso de A.E.A.—Box 2122T, P.O., Elizabeth Street, Melbourne.

Kasisto: K. Linton, 11 Poplar Street, South Caulfield, S.E.8.

Vol. 12, N-ro 76.

MELBURNO.

Mar.-Apr., 1957.

INTERNATIONAL LANGUAGE SURVIVES THE PASSING OF THE EPOCHS

Are There Analogies Between the Ancient and the Modern Auxiliary Tongue?

An Address by Rev. C. C. Cowling, read by proxy in Esperanto at the Congress in Canberra, under title "Interepokeco kaj Esperanto."

In the centuries immediately before and after Christ the civilised world used a simple form of Greek as a second language for all men.

In the first years the history of this international language resembled that of Esperanto up to the present. Groups were formed to study and spread the language, classical works of diverse cultures were translated, and bit by bit original writings of universal merit appeared in it.

It is noteworthy that the educated in many spheres mocked and condemned that ancient international language; nevertheless they later found it necessary to use it in relations with other peoples. This may prove to be the case also with Esperanto.

I wish, however, to draw attention to two phenomena: (1) the tendency for works in an international language to survive their epoch and live on indefinitely, and (2) the slow dying away of literature in national languages, even though of great merit.

Almost two hundred years before Christ there appeared a long book which we may name "The Wisdom of Jesus, the Son of Sirach". It was in Hebrew; but owing to its interest, and to the fact that the Hebrews, dispersed in many lands, had forgot-

ten their own language, the book soon appeared in the international language, in which form it was warmly received.

Then a strange thing happened. Almost everyone recognised the value of the work and read it only in its international form. Finally, the Hebrew original was completely forgotten and lost, and is today unknown. To read a work of their own national culture the Hebrews themselves had to turn to the international language!

Came the time when they felt this to be intolerable. So they retranslated the book from the international language into their own national language. But this new translation lived for only a little while, and in its turn disappeared, although the Greek, or international language, has remained to this day. Recently archaeologists found parts of this second, Hebrew, translation, but the manuscripts have interest only for such as are versed in Hebrew. Others interested turn to the Greek, or to a translation from this "Esperanto of antiquity". It would be easy to describe the history of other works and find the same result:—

- (1) That the work in the national language has disappeared.
- (2) That the international language

form still lives on.

- (3) That the learned men of antiquity made fun of the "Esperanto" of their time.
- (4) That circumstances forced them to use it.
- (5) That today we may understand the men of that time only by their international language.

It may well be, in centuries past, that there lived many a genius, comparable with Homer and Virgil, who have been forgotten simply because they wrote in national languages.

We must, however, understand that a work does not live and influence future generations solely by virtue of its being written in an international language. This can be helpful—even necessary—but to survive the epochs, a work must have relation to those things that are universal in themselves. "The Wisdom of Jesus" still lives, not simply because it was written in the international language, but because it deals with things of abiding interest to all men—the relation of God to humanity, the care of children, the right attitude to parents, to doctors, to teachers, &c., even to the difficulties of translators.

Perhaps the most famous books ever written were the four Gospels and the Letters of Paul. It is clearly seen that in them are blended the two principles, (1) international language (for they were written in the vernacular, popular Greek) and (2) universal interest. Without the latter, these writings would interest no one; without the former they probably would not now exist—certain it is that national language translations of them, made in the early period, have long since been forgotten.

By these remarks I wish first to encourage those Esperantists who have been mocked for their enthusiasm, and to assure them that history proves the necessity of an international language. Second, I wish to stimulate them to a concern with enduring, constant and universal interests of humanity. For our movement its own problems are not enough. Let us give ourselves to the high aim of international brotherhood, till that day of attainment when:

"With one common tongue the sure foundation,

All men understanding each other,

One in concord, nation unto nation,
Man to man shall brother be to brother."

(This verse from "La Espero" is by Fleming Fulcher. We have traced five English translations of this poem. "British Esperantist," May 1942, Jan. 1943, Nov.-Dec. 1946.—Editor.)

"PYGMALION" IN ESPERANTO.

Before 250 auditors in June last, Shaw's comedy unabridged was presented by an Esperanto group in Praha. The task of translation—a most difficult one—was ably done by Eva Suchardova, and the cast, amateur and professional, performed their roles admirably.

The play depends for its effectiveness on the interplay of different English dialects and the significance in conventional society of speech forms and idioms artistically introduced at junctures in the action. An amusing highlight is when Liza, a gamine under tutelage of Professor Higgins, a speech expert, while presumably educated to a safe point of correct etiquette both of behaviour and diction, perfectly retains the former, but, under the influence of a friendly tea-table atmosphere, lapses badly in the latter, falling into the argot of her former life. When she voiced the notorious line—rendered "Mi fajfas pri tio!"—"sincere laughter rippled through the theatre." A mocking repetition of it by a lady guest convulsed the audience. The Esperanto phrase, innocuous to us, must be as moving to the Czechs as the carmine original is to us.

Details of this amazing histrionic and linguistic triumph are given in "Esperanto," Sept., 1956. That such work should have been successfully carried out by Czechs rather than English art lovers reflects credit on the former and lack of enterprise on the latter. It is, in itself, an unintentional rebuke, administered in the best way possible.

LANDNOMOJ.

"Kial nia Akademio ne finfine okupas sin pri starigo de listo propona de landnomoj? Mi audas: Brasilo, Brazilio, Brazilo; Maltio (Z. Malto), Israelo, Izraelo . . . kaj tielade plu. Post 70 jaroj ni ankoraŭ ne kapablis solvi tiun gravan demandon".

—M. BUTIN.

Recenzoj

"LA INFANA RASO", originala poemo de William Auld. Eld. Stafeto (Juan Regulo Perez). 104 p. Per agentoj. 15s. Aŭstralia mono.

Laŭ sia formo la verko estas plejparte impresiona, konforme kun la desegnoj. Laŭ enhavo ĝi estas materiisma; mankas al ĝi tiuj transcende-metafizikaj elementoj, kiuj enecas kaj motivas la pozicion de daŭra vivipovo. Oni povus pensi, ke A. ricevis ian inspiron de la greka ateismano Lukreto, kiu verkis longan negativan verkon pri supozata naturo de Phomo.

Facilanime asertante, ke la ekzisto de Dio ne gravas, A. laŭ ofte uzita artifiko, konstruas Dion el pajlo, donas al ĝi tre malagrablajn trajtojn, kaj eke ĝin detruas per kraĉondo da sarkasmo.

Ni demandas: Por kio servas ĉi stranga verko, drola, moka, miksaĵo el sobro kaj satiro, ekscentrika obscuro kaj aŭdaca klaro?—Por doni plezuron, se ne profiton, al tiu versama elito, kiu havas simpatian aŭ altirigecon kun la aŭtoro, kaj aprobas lian bazan filozofion, laŭgrade tion ili povas senti (ni ne diras, sistemigi) ĝin.

La verko staras ekster atingo de komenculoj; pli harditaj legantoj bezonas paciencon por orienti la spiriton kaj akriĝi la cerbon se ili deziras ĝui vagadon tra ĉi kampo de l'fantazio.

Ĝi odoras pesimismen propran al multo en la greka pensado. Mankas al ĝi la sento pri ia superarka plano, ia celo, kiun la homaro destinfine atingos, ia kosma kulmino, kiu, malgraŭ certasenca fineco, tamen estus nedirebla riĉa en potenco kaj potencialo, kiujn nek okulo vidis, nek orelo priaŭdis

Anstataŭe, estas sugestita la ideo de vivcikloj, kiuj procesie pasas, nur por fine fali en la polvon de l'forgesiteco. Simile Spengler post 1918 revivigis tiun antikvan koncepton, vestinte ĝin per la robo de pseŭdo-scienca.

Nekongrue, estas ankaŭ ĥoj de la falsa optimismo de la 18-19-jarcenta "homa memperfektigo". La aŭtoro ŝvebas inter "mortaj mondoj" kaj "blinda celo" (!)—kaj la nocio, ke

iel la homaro, sen helpo de supernaturaj influoj, posedas kapablon memevolui ĝin ĉiam pli supren. "Ia raso konstruos teran ĉielon, post la mort' de Dio", kies ekzisto estis ali-paĝe rigardita kiel "negrava". Sed Li devis "ekzisti", por ke Li ankaŭ "mortu", duvoĉe argumentas A. "Evoluigi nian genion kaj nian amon: jen la sola vera religio".

Tio kontrastigas kun la senpotenco kaj senceleco de la hom-atomoj, la "bakterio", kiu svarmas sur nia kotbuleto, nia "polvero ridinda ĉe la kosmorando".

Estas dubinde, ke la homaro sia savos, tirante je la propraj ŝulcoj. Ĝi bezonas, kaj laŭdire ankaŭ disponas, la altiran forton de Ekstera Io, kio efikas por ĝia kuraco kaj paco.

Povas esti, ke homoj de antikva tempo efektive sentis ian misteran realaĵon, kiam ili avertis pri personecaj fortoj, subtilaj, nevideblaj, kiuj faras el la homa animo kampon de batalo, kies rezulto havas eternan signifon. "La demonoj lin havas," diris Lutero pri Hitler, kiun li rigardis kiel sub la rego de nehomaj fortoj diable malamikaj al la kreaĵ manifestoj de Alia, Antiteza, Personeco.

Sed la moderna homo jam grande perdis sentemon pri la malbono, kaj kun tio ankaŭ senton de respondeco en la pli vasta morala senco. Li lasis fali la ŝirmilojn, kiujn cent generacioj konstruis por la homa animo; li do staras nude senarmila por fronti la atakon de ekstere. Vane oni neas, neadas. Ĉiu homo jen-jene sentas en la mondo la efikadon de ia fipotenco, kiu elpelas racion, moderon, juston, starigante en la koro de l'homoj la finan blasfemon, nome ke la kreito estas la kreanto—ke la homo estas embria Dio. La nuna stato de la mondsocio elokvente predikas la malon, kaj, en la terura lumo de la mifereca perspektivo, la doktrino de homa memperfektigo aspektas sen-senca sofismo.

A. ignoras tion kaj similajn pensovojojn: li skribas kvazaŭ la kolosaj intelektoj kaj profunde scercentaj spiritoj havas nenion por li. C. S. Lewis, fama Oksforda klerulo, ne permesis al pure humanisma erudicio bari lin kontraŭ decidema reveno al la pensado de fruaj kristanoj, por peni re-taksi en aktualaj interpretoj la mis-

terajn dirojn de homoj, kiuj, anime armitaj pli bone ol la modernuloj, penetre meditis la naturon kaj destinton de la homoj.

Bedaŭrinde, ke originalaj fortoŝtrecoj en la E-a literaturo (ekz. "Jarmiloj Pasis" k.a.) montras pensosintenojn de mensoj fermitaj kontraŭ ĉio simila al la tradicia kredo, simple ĉar tradicia. Tiu negativa dogmemo rezultigas misfokusajn, malekvilibran prezenton, kiu havas nenian logforton por vere liberaj pensuloj.

RAKONTOJ el la naciliberiga batalo de jugoslavaj popoloj: Trad. A. Sekelj. Eld. Serbia E-Ligo, Terazije 42, Jugoslavio. 34 p. 0.20 dol.

Ĝi donas meritan tributon al galerio da herooj. En Jugoslavio kaj aliaj landoj torturitaj de la Nazioj, la partizanoj, pro postmilita grandpolitiko, ne ricevis ĝustan honoron, sed male ofte devis kaj devas elporti malestimon kaj suspekton. Ekzemple, en Francujo iliaj gazetoj jam mortis kaj la herooj de la rezisto ne ĝuas favoron de ŝtatregaj rondoj. En la okupacia Germanujo ne estis saĝe montri al tiu patrujama servo partizana; la belaj oficoj iris al la "kapabluloj" kunlaborintaj kun la Hitleranoj. Tio feliĉe ne estas vera pri Jugoslavio.

Ankaŭ Germanoj servis partizane en J.S.—eĉ oficirigis, kaj iuj pereis.

La rakontoj ĝenerale ne estas amuzaj, kvankam la tradukinto nomis ilin tiaj—tamen tie kaj tie la bonhumoro de brava popolo anime faciligas la legadon.

SUSPEKTINDA PERSONO. Duka akta komedio de B. Nušić. Trad. A. Sekelj. Eld. de la supra. 56 p., 0.30 dol.

Sukcesa teatraĵo, la verko etose rememorigas pri "La Revizoro" de Gogol (trad. Zamenhof), kaj rajtas kompariĝi kun ĝi laŭ esprima klareco kaj amuza luddefekto. Verva, viveca, ĝi elspiras ankaŭ iom de la sprito de Moliere, precipe ĉe la amintrigo. Kelkaj strangaj vortoj estas ŝanĝindaj per pli tuje kompreneblaj.

LA APEROJ DE LA SANKTA VIRGULINO EN LA PASINTA JARCENTO: Eld. la Fratoj de la Karitato, Stropstrato 127, Gent, Belgium. Senpage, eventuale sendu rp.k.

Bele presita, klarlingva broŝuro, kiu

certe plaĉos al ĉiu romkatoliko kaj verŝajne ankaŭ al aliaj kun emo al klasike korekta prozo, simpla kaj senbalasta.

La aperoj: 1830, en Parizo al Catherine Laboure. 1846 en La Sallette al du geknaboj. Familia nomo? 1858 en Lourdes al Bernadette Soubirous. 1876 en Pellevoisin al Estelle Faguette. 1917 en Fatima al infanoj kaj amaso da aliaj. Familia nomo? 1932 en Beauraing al kvar infanoj Degeimbre. 1933 en Banneux al knabino, ne nomita.

La aŭtoro trifoje ellasis la nomojn de la vidintoj, kio ŝajnas al ni stranga preterlaso en historio ankoraŭ dubataj de multaj enketuloj.

Simile al la diroj de spiritismaj medioj, la efektiva signifo de la transmondaj komunikoj ŝajnas ne proporcie valora al la miraklo de videbla Dia interveno en homajn aferojn. Ekzemple, la ordono: "starigi kapelon" . . . kaj similajn. Estas klare, ke la aperoj havas malmulton efikon ekster la aparta rondo al kiu ili estis adresitaj. La politika mondo iras sian vojon blinde al tiaj lumportantoj, kaj ties avertoj pri la kurado de l'estonta historio.

AIR FRANCE, 9 Avenue General-Leclerc, Marseilles (3), eldonis invite al la Kongresanoj folion plaĉan por la okuloj. Ĝi trafingve prezentas sian "varon". Ni rimarkas: "aerŝiparo", kiu estas direktebla balono. Kial ne estas pli vaste uzata "aviono", jam plene internacia? Senkomente "Esperanto" (Nov. 1953, p. 317) uzis tiun vorton.

PROSPEKTO PRI TEGERNSEER TAL. Ĉu vi jam vizitis tiun belan feriejon sude de Muenchen, aŭ dezirus ĝin vidi? Petu tiun juvelon de turisma arto ĉe Anna M. Orterer, 13b Kreuth bei Tegernsee, Rathaus (Germany).—F.R.B.

Mr. K. Linton, our treasurer, informs that we no longer publish in the gazette the names of subscribers, but an official receipt and a receipt sticker will be posted direct on postage sent to cover this. In an effort to achieve regular publication without a deficit, all are urged to support to the fullest the work of our treasurer in strengthening our position in this regard.

JULES VERNE.

"The unsettled, insecure bourgeois . . . the views of this class are reflected by Jules Verne in the same way that social tensions of the lower middle class here at the turn of the century were reflected by H. G. Wells. For example, Verne was an enthusiastic Esperantist; the idea of a world language, at that time, was both the reflection of imperialist expansion and a protest against it"—"New Statesman and Nation," 15th Sept., 1956.

(We like the "For example," which implies that many, if not most, Esperantists are of the class mentioned. And we ask if "the idea" is still the same "reflection" and "protest."—Editor.)

WORLD CLIPPINGS.

Braille Volumes in Esperanto at the British Museum total 920.

BULGARIA: A lectorate has been established in Sofia Superior Economics Institute (Karl Marx). Teaching began 12th Oct.

"Nuntempa Bulgario" now appears in Esperanto. First number was sold out quickly. The State has given 30,000 leva (1½ million French fr.) to the Bulgarian Esperanto Assocn.

In the Postal Institute School 80 have begun to learn Esp-o, under a paid professor.

The "Manuel d'Initiation a l'Espéranto," published and sold through the customary book channels by the famous **Editions Nova** met with marked success. A new edition is in progress (Rondo, p. 120). It is the first of a series of such works on Esperanto.

The Chinese Esperanto League has been re-established: P.O. Kesto 77, Peking.

The "Socialist Leader," Glasgow, reprinted an article by Gorki: "Ĉu Esperanto Estas Utopio?" (4/8) and another (25/8) on the favorably revised pages on Esperanto in the "Great Soviet Encyclopedia".

BOULOGNE-SUR-MER.

Max Butin, nun ĉ. 70-jara, estis unu el la malmultaj germanoj alestaj je la Kongreso Unua de E-o en 1905. Tiel li informis min per p.k. Nur malmultaj de tiuj kongresanoj verŝajne ankoraŭ vivas.—Red.

PIPAJ PAROLOJ.

"Esperanto estas la A.B.C. de la internaciismo", diris Henri Barbusse. Sed tiu internaciisto ne lernis eĉ tiun abocan.—Lanti.

★

"Ni ekzamenos . . . interesan manieron prezenti la disvolvigon de la homaro pere de lumbildoj" (el presajo pri la Geonismo). Tio estas, "per-lumbilda prezento". Kompreneble, ni scias, ke la homaro bele "disvolvigis" per de Usonaj film(aĉ)oj.

★

"La komencantoj ĉiam estos boavenaj en la Universala Kongreso sed la eternaj komencantoj aŭ la homoj, kiuj ne scipovas E-on kaj devas paroli en naciaj lingvoj, preferu ne partoprenu. Ankaŭ la turistoj, kiuj venas nur por viziti la urbon kaj hazarde aperas en la kongresa balo, kaj la homoj, kies sola celo estas renkonti la korespondantinton, ne farigu kongresanoj."—G. C. Fighiera.

★

"Eble la solaj libroj verkitaj en pure Zamenhofa lingvo aperis en Rio de Janeiro"—La Libro de la Spirito (trad. L. C. Porto Carriero Neto) kaj La Evangelio laŭ Spiritismo (trad. I. G. Braga)—asertis "Nica Literatura Revuo". En kio valoras tia aserto? Laŭ kiaj principoj la revuo tiel dogmas? Ĉu ne ekzemple "La Karavano" (trad. J. W. Eggleton) pli rajtas al tiu komparo?

★

"Bona poezio estas tiu, kiu malgraŭ ritmoj kaj rimoj konservas la ĉarmon de bona prozo."

(Raymond Schwartz.)

NEKROLOGO.

Kun profunda doloro ni informas pri la morto de Richard Latimer, **fidela samcelano kaj komitatano de A.E.A.** La 5an de aprilo li trafis en aŭtociklan akcidenton, kaj ricevis vundojn pro kio li finspiris en la hospitalo Parramatta la 7an de aprilo. Li estis fraŭlo. Sub lia gvido, 30 samoj jam antaŭe aranĝis viziti la flotstacion "Albatross" ĉe Nowra, kie li deĵoris. Ni kondolencas kun liaj parencoj.

E. DREZEN, aŭtoro de la plej kompleta "Historio de la Mondlingvo (1931) k.a., mortis en malliberejo rusa.

N. NEKRASOV, tradukinto de Eugeno Onegin kaj tre fekunda E. verkisto, mortfalis ĉe batalfronto. Cefkunlaboranto de la Enciklopedio de E-o, Nekrasov verkis la artikolon pri Drezno.

VERSAJOJ DE JOE.

Lanti, genia, eksplodema,
Cinika, tamen simplanima,
Jen gaja, kun esper' senlima,
Jen drone en turment' ekstrema.

Dekses leĝoj ligas nin
En la Esperanta sin'.
La deksepa: vera gemo
Unuvorta: . . . "Toleremo!"
Toleremo, ankaŭ vi
Respektigu inter ni.

Pikite de vespo,
Mi lasis gin fuĝi,
Nian kontraston
Tiel por pruvi.

Ĉar, se mi estus
Gin mortfrapinta,
Min mem vespego
Mi estus montrinta.

LA NOVA ESPERO.

Dediĉita al nia prezidantino.

En la klubo sonas nova kanto,
Tra la klubo iris forta voko:
Jes, aperis nova prezidanto!
Do, novaĵo en malnova loko!
En estinta temp' ni havis viron,
Kiu regis nin per mola mano—
Ĉu vi povas senti nian miron,
Ke estrigas firma ina ano?!

Sub la sankta signo de l' Gracio
Kolektigas jaŭde la klubuloj—
Novan vivon nun injektas Dio
En la korpon de la dormetuloj.
Baldaŭ kreskos sur la verda kampo
Floroj de la reciproka amo;
Disvastigos, kiel brila lampo,
Scio de la esperanta famo.

—Fritz Mueller-Sorau: Sydney
Esperanto Society.

KORESPONDADO.

J. MATULA, Jihlava, Srasna 8,
Czechoslovakia.

Stanislaw Walicki, ul. Zgierska
96/98, Lodz—9, Poland. "En la pa-
trujo de E. komenciĝas nova epoko
socia kaj politika . . ."

Jan Adamezyk, Wielopolska 27/30,
Szczecin, Poland.

Roman Taczewski, ul. Krasickiego
25, Myszkom, woj. Stalínogrod, Po-
land, 47-jara membro de UEA, dez.
interŝ. p.m. kaj p.k.

LINGVAJ LUMETOJ.

"La kongreso okazos dum aŭgusto."
Tio estas korekta, se la kongreso
okazos de la unua ĝis la 31a de
aŭgusto, ĉar DUM montras, lau P.V.:
"tempon, en kies daŭro io okazas".
Sed ordinare kongreso okazas EN un
monato, t.e. dum unu, kelkaj aŭ
multaj tagoj en tiu monato. Simile,
infano ordinare ploras EN la nokto,
ne DUM la nokto. Infanoj, kiuj
kriploras dum la nokto, verŝajne
havas mizeran ŝancon de pluvivado.

★

"Last but not least." Waringhien
(Eseoj, p. 206): laste sed ne lasta.
T.e. laste menciita, sed neniel lasta
en la estimo de la viciginto. Cetere,
W. menciis en "Progresanto", ke
Grosjean-Maupin proponis: lastvice
sed ne lastrange.

★

Q. W. X. Y. estu respektive pronon-
cataj kiel ku, duobla vo, ikso kaj i
greka. La nomo **ipsilon** estu rezerva-
vita por la responda litero de la Greka
alfabeto.

IAN, TIAN, KIAN?

En la unua lernolibro E-a (1887)
kaj en la Dua Libro aperis la formoj
tian, ian, kian anstataŭ la nunaj: tiam,
iam, kiam. De Wahl atentigis Za-
menhof pri la koincido de tiuj formoj
kun la akuzativaj de tia, ia, kia. Tio
estas la unusola ŝango en E-o depost
1887. La Fundamento ankoraŭ ne
estis starigita, do neniam rompo okazis
en ĝi. Ŝajnas al iuj tre strange, ke
Z. mem ne rimarkis tiun koincidon
dum la ĉirkau okjara provperiodo
privata de la lingvo.

AKURATE.

La cetere bonega instruilo "La
Progresanto" saĝe sin turnus al la
Plena Vortaro, kaj lernas la signifon
de tiu vorto. Tion farinte, ĝi sen-
dube evitus la misuzon sence de "ek-
zakte". Laŭdante libron, ĝi tamen
"aplaŭdus pli akurate kompostitan

eldonon".—Per tio ĝi volas diri: eldonon pli **korekte** kompostitan, kaj certe ne (kiel ĝi efektive skribis) "eldonon kompostitan en ĝusta interkonsentita tempo". Plezure ni notas, ke Lapenna korekte uzis la vorton sur p. 121 de "Esperanto", skribante pri la "akurateco" de la kongresa tagordo.

Samgazete (p. 138: . . . kiu honorigas sian . . .) ankaŭ R. B. sciuj pri la Z-a: "buĉado malhonoras la . . . mondon". Tamen la P.V. tie parolas per du voĉoj: honor(ig)i.

P. 159: Tie troviĝas kroma ekzemplo de misuzo. La klera recenzanto, traktante la nuancojn de la kemia nomaro, tamen, en la komuna lingvaĵo, nezorge skribis: ". . . la uzanto postulas . . . akuratecon kaj kompletecon de la verko . . ."

Estas klare evidente, ke li ne volis tiel sin esprimi. Ne temas pri "ĝustatempeco" sed pri "ekzakta korekteco".

Cetere la difino, aŭ difinaro, en Oficiala Klasika Libro estas multe pli elasta ol tiu en la Plena Vortaro, kiu avertas kontraŭ uzo en senco de "ekzakta". La O.K.L., per sia tro ĝeneraliga kaj kelksenca difinaro, rabas forton for de "akurat" kaj igas neutilaj sinonimoj la formojn: preciza, ekzakta, korekta k.t.p.

MALMOLNUKA.

Zamenhof uzis la vorton almenaŭ naŭ fojojn en sia traduko de la Biblio hebrea. A. stiffnecked; G. hartnaeckig. Eble ĝi estas hebrea idiotismo. La formo "rigidnuka" prezentas sin kiel konsiderinda alternativo. Ankaŭ simple, "(perverse) obstina"!

LONGAJ FRAZOJ.

Ne ĉiuj longaj frazoj estas malbelaj aŭ malklaraj. Serpentumanta frazo, farita de majstro kiel Ruskin aŭ Macaulay, povas esti artisma juvelo. Tamen ordinaraĵoj homoj saĝe evitus konscian imiton de tiu stilo, kaj ankaŭ bridus nekonscian inklinon labirinte verki, generante monstrojn en kiuj tro distancas la punktoj interpunkciaj. En "Dia Regno" iu prave kritikis frazon en "Esperanto" (p. 106): "En la fino . . . demando". 12 linioj, 7 propozicioj kun 7 komoj! "Nur eminentaj Esperanto-lingvistoj povas kompreni la enhavon de tia

longa teksto".

En Fundamenta Krest., p. 271, 9a eld., Zamenhof aŭtoris 17-linian frazon: "Ĉiuj . . . kontraŭparoloj". Prove legu ĝin antaŭ maturaj E-istoj, kaj rimarku ilian reason.

La aŭtoro de la kriteria vivo de Z., Privat, uzadis en tiu verko, kiel kutime, stilon kristale klaran, grandparte pro sia konstanta manipulo de polure-pigmeaj frazetoj kernece trafaj. Ekz., sur p. 65. Kiel retoro, Privat staras unuarange, kaj tion li povas danki multmezure al sia kurtforma frazkreado.

JAPANESE NOTES.

After the war Japanese E-ists succeeded in getting chapters on E-o and Zamenhof into second-grade school readers. In one such book there is a fairly long biography of Zamenhof; in another, an article by Prof. Yukawa, Nobel Prize winner, in which he recommends E-o.

Heibonsya Publishing House, Tokio, used E-o to collect material for its 15 volumes of children's essays, and popular geographic matter, drawn from all the world. It used English, French and other languages also, but acknowledges most help from E-o. For the volume "Northern Europe" 96% was supplied by E-ists.

Another example of E-o in action is seen in the sending to Sweden of a Japanese chick-sexer. The person chosen had to be an E-ist. He reported high success abroad, and marked facility in attaining it through his use of E-o. This has stimulated interest in E-o among Japanese chick-classers—much sought after by foreign interests.

In Japan 50,000 have learned E-o and the Jap. E. Inst. has some 1800 members. In more than 50 towns (and 25 unis.) are groups totalling about 2000.

The first man to sow an E-a seed in Japan—G. E. Gauntlett—has died in Tokio at 88. Born at Swansea, he went to Japan in 1890 and lived there as a Japanese citizen. He heard of E-o in 1903, and helped to found the Jap. E. Assn. in 1906.

These "firsts" among our pioneers are thinning out. Remember R. H. Geoghegan, the Oxford student who corresponded with Zamenhof in 1887, the year E-o was given to the world?

Doubt still murks the identity of the first apostle in Australia, but John Booth of Melbourne (1905) is regarded as the "father".

LINGVOSCIO DE Z.

La Rondo, Feb. 1948. Max Butin skribis:—Mi ofte babilis kun Z. kaj sperte scias, ke liaj scioj de la angla lingvo estis tre, tre modestaj. Tiel same li ne prenis la danan originalon de la Fabeloj de Andersen, sed uzis la fuŝan germanan mistradukon; ĉiuj danoj estas ŝokataj, legante tian krip-lajon.

"Sed ni estu indulgemaj kaj ne riproĉu nian majstron. Ni ne forgesu la cirkonstancojn tiamatempajn. Z. estis sola, preskau izolita, liaj adeptoj nespertaj, malmultaj, nur balbutantoj de la nova lingvo. Ni neniam forgesu, ke Z. intence tradukis, kreis, verkis, amasigis materialon por pruvi, ke Esperanto ne estas utopiaĵo, fantaziaĵo, sed io vivanta, idioma parol-eblo, ideojn-diskoniga".

LA RONDO.

Malgrau sia malgranda formato, kaj malmulto da paĝoj, nia organo efektive enhavas en ĉiu numero ok futojn da densa kompostajo—sufiĉe da materialo por "plenigi" multe pli imponan gazeton, se tiun oni ornamus per logaj reklamoj, desegnoj, fotoj, dekora girlandajo kaj similaj por manĝi la spacon kaj beligi la aspekton de la eldonajo.

Fotoalbumo pri VARSOVIO. Tiu ĉi riĉa kolekto pri la nuntempa Pola ĉefurbo plezure mirigos ĉiun simpatianton kun tiu glora metropolo. Ĝi estas majstra kompilo, kaj certe devas esti en la manoj de ĉiu E-a apostolo, por kiu ĝi estus unuaklasa propagandilo. La komparaj fotoj de 1945 kaj 1956 estas fulme frapaj kaj konvinkas pri la eterna vivemo de la Pola popolo. Ricevota kontraŭ gazetoj, libroj k.s. ĉe: Esperanta Asocio, KoZIA 3, Warsaw.

NI GRATULAS!

S-ino H. McGrath, de la Esperanto-Klubo en Perth, estas la unua, gajni la Norman Superan Diplomon. Brava venko!

"PARNASA GVIDLIBRO."

Ĉu leganto havas ekzempleron, kiun li vendus al S-ro Ken Linton, 11 Poplar St., South Caulfield, SE8,

POLICO

August Weide, Eggerstedtstr. 41, Hamburg-Altona, Germany, kompilas liston de E-parolaj policanoj en diversaj landoj. La unua bulteno en-havas tri foliojn da nomoj. Ĉu vi aldonus vian, amiko koncernata?

KIEL DOMAGE!

Sovetio kaj la Okcidento rivalas en la ludo, akiri militkrimulojn por siaj nukleaj kaj raketaj eksperimentoj.

Goering estis malsaĝa. Se li akirus jam sufiĉe da scio pri tiuj diabloj, li hodiaŭ estus dorlotata luksulo ĉe unu flanko de la Fera Kurteno.

WHITCOMBE & TOMBS

(according to "Boletín de la Sociedad Uruguaya de Esperanto") the important book sellers and publishers of New Zealand, with branches in Australia and London, use Esperanto in its foreign correspondence.

AUSTRALIA KRONIKO.

For important editorial reasons this issue of "La Rondo" was urgently sent to the printer without the inclusion of Club Reports from Perth, Hobart, Sydney and Canberra.

All these, as well as a detailed report of the forthcoming Australian Esperanto Congress, will appear without fail in our next issue, to be published very shortly.

Reports from Brisbane and Adelaide would be a welcome addition.

La Rondo

The Australian Esperanto Monthly

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Jarkotizo: 12½\$ (aŭ 20 respondkuponoj).

Anoncoj: Tri linioj: 43.



Redaktoro: F. R. BANHAM, 2 Banchory St., Essendon, W.5, Victoria.

Adreso de A.E.A.—Box 2122T, P.O., Elizabeth Street, Melbourne.

Kasisto: K. Linton, 11 Poplar Street, South Caulfield, S.E.8.

Vol. 12, N-ro 77.

MELBURNO.

Majo-Junio, 1957.

PLEA FOR A POSITIVE PHILOLOGY

Its Aim and End?—The Banishing of Babel.

What is philology's contribution to mankind? What relation has the prodigious research of a Muller or a Bopp to the smoother working of the world? That the roots of present-day languages have been laid bare in the soil of a primitive Mother-speech; that a law governs the transmutation of consonants from tongue to tongue; that the words of our idiom can, by tracing back its stems to distant sources of derivation, be made to speak to us with fresh significance—these things are interesting and instructive.

But surely philology has some more positive contribution to make to our lopsided world. In the technical field unifying influences are ever welding mankind closer economically and geographically; but as far as language is concerned two professors, one from Rumania and the other from Japan, are as helpless to express themselves as ever they were. What has philology done for them, and for us? Would it not be right to say that the end and aim of that science should be to front the problem of language diversity and aid to the establishment of an international tongue? Chairs of **positive** philology should be set up in all universities and an institute founded for Inter-European language research where the claims of Esperanto as a practical medium could be adequately examined.

Esperanto has hitherto made its way independent of external author-

ity, and while there is some weight in the contention that social factors outside purely academic control may play a part in the general acceptance of an international language, there is a feeling that a representative statement of belief in the principle itself, coming from those who speak for philology, would do much to loosen up a tongue-tied world.

There are signs of an awakening awareness of this responsibility. Word-masters like Jespersen, Breal, Bailly, Schuchardt, Ostwald, Meillet, Collinder and Collinson have voiced their belief in the soundness of the idea, and some have even witnessed to the effectiveness of planned language.

Margaret Schlauch, professor of English at New York University ("Gift of Tongues," 1943) said: "Professional linguists conceive their study to be limited to a factual analysis of languages as they are, but they may be persuaded to consider the problem as citizens of the world (when peace comes)."

Bodmer, in "Loom of Language" (1944): "Bacon has said that the true and lawful goal of science is to endow human life with new powers and inventions. Professor Jespersen had the courage and originality to emphasise that philology has the same 'true and lawful goal' as any other science." Further, "A more sympathetic attitude towards the need for a constructed auxiliary language would open fields of enquiry that have been neglected by linguists in

the past. Because they accept languages as products of growth, our scholars have for too long sacrificed the study of functional efficiency to the task of recording what is irregular, irrational and uneconomical in speech. A more lively interest in language planning would direct their efforts towards new tasks."

J. B. McConchie ("John o'London's," June 2, 1934): "Philology appears to me to be among the most futile of sciences, since, meantime, a study of it enables no one to do anything with language. If philologists were given authority to alter and direct it, they might be able to prevent many of the crudities which creep in and which they deplore."

Nietzsche in 1876 had cried: "There will be an international language as certainly as there will be air travel. To what end has linguistic science been studying for a whole century the laws of language and analysing what is necessary, valuable and original in each of the tongues of man?"

There is further evidence of the new spirit in philology in the conference on "constructed languages" held by the Modern Language Assn. in New York recently.

May the philology of the future, in step with the International Age, be found in collaboration with those versed in the study of plan language, and by its wider researches evolve a definite plan, the fruits of which may finally free mankind from the shackles it has borne since Babel.—F.R.B.

LIBERA FORUMO.

"Plaĉus min vidi, kune kun la nekrologoj de Joab Eliot kaj Brendon Clark, specimenojn de ilia verkarto, kiel modestan tributon al ilia laboro por E-o. Sed dum la redakcio uzas du paĝojn (do, kvaronon de la numero) por klubraportoj, mi devas resti atende plendanta.

"Por fortigi nian interfratigan lingvon, ĉu estas necese, ke ni senĉese informu la mirantan mondon, ke Hobo en Adelaide sin trovis en "klubo", kaj ke tie 20 kaj tie ĉi 22 homoj partoprenis "plensukcesan" (kompreneble!) Zamenhofan Feston? En Melburno "kunvenis pli ol 50": ĉu tio signifas 5000—aŭ nur 51?

"Legante Eŭropajn E-gazetojn, ekzemple "La Nica Revuo", mi ne

ricevas senton pri 'la nuna stagno en E-o'—kaj ne volas substreki vian rimarkon pri tiu pesinismajo. Ĉu eble tiu stagno ekzistas nur ĉe La Rondo?"

—KOHERO.

Respondo de la redaktoro: Amiko, La R. ne pretendas esti literatura gazeto; ĝi estas la landa organo de la A.E.A.; ĝia ĉefa devo estas, plene raporti pri E-a agado en Aŭstralio, pri organizaj planoj kaj problemoj, pri personaj aferoj k.t.p. Kio ŝajnas al kelkiuj nur klaĉa kaĉo, tio evidente interesas tiun multon da homoj, kiuj pli-malpli vigle kirligas en klubaktivo. Ni rimarku, ke la klubojn kaj la Asocion oni tenas vivantaj nur per sinofera klopodado, kaj tempa, mona oferado, kio en si mem meritas mencion inter ni.

La dua devo estas, informi la Aŭstraliajn E-istojn pri la movado alianda, observante ĉion gravan aŭ signifan, precipe tion, kio koncernas nin kiel efektivan parton de la tutmonda organizo.

La kulturo kaj literaturo do estas por ni—lukso, kiun ni povas frandi nur se spaco disponeblas por tio. Por la literaturamanto estas aboneblaj pluraj subtenindaj gazetoj pure literaturaj, kontraŭ kiuj ni cetere ne volas, nek povas konkurenci. Sed ĝuste nur ni povas—eĉ se iom tede por vi—kroniki nian propran laboron, kaj publike solvi niajn problemojn. Kluba, kolektiva agado—kaj ĝia konforma publikado—jen la forto, kiu nutras la movadon, sekve La Rondo'n, kaj tenas ambaŭ en ekzisto.

Kiam ĉi-lando sufiĉe saĝiĝos kaj partoprenos la internacian kulturon, niaj nepoj abonos la Aŭstralian E-revuon, pri kiu vi reve sopiras. Tamen, ĉar la homa naturo senfine strebos al nebula homa perfekteco, ĝia redaktoro ankoraŭ en tiu tempo ricevos instigon de bonintencaj galplumoj.

"La gazeto entenas pli ol informo ol kutime pri la progreso de la diversaj grupoj en Aŭstralio. Esperinde, ke la grupoj daŭre sendos plenan informon al la sekretario. Bonaj raportoj instigas unu la alian. La ĉefartikolo provizas taŭgan materialon por subteni E-on."—MEKano.

Australia Kroniko

● PERTH: 14 Feb. okazis la unua kunveno en la nova hejmo de la Ligo ĉe 196 Adelaide Terrace, Perth. Multage ĉeestis, kaj s-no Hutchinson lerte ludis piano-akordionon. S-ro Helir el Kalgoorlie speciale flugis al Perth por tiu okazo.

Klasoj komencigis 27-28 Feb. ĉe la ligĉambroj, kun kelkaj personoj en ĉiu vespero.

27 Feb. s-no McGrath, vicprez., bonvenigis s-ron King, vicprez. de la NZEA, ĉe Fremantle en la ŝipo Occania. S-ro Brodie konkukis lin tra la jurnalfabriko de la "West Australian". Vespere liganoj renkontis s-ron King ĉe la ligĉambro, kaj survoje al la ŝipo s-ro Brodie montris al li la urblumojn de Perth kaj Fremantle.

24 Marto, 30 amikoj en 7 aŭtoj veturis laŭmarbordo de Cottesloe ĝis Sorrento, revenis al North Beach kaj temanĝetis ĉe la hejmo de s-ro E. A. Walker.

S-ro H. Lundquist, mekanikisto de la ŝipo Coolgardie, vizitis nin en Perth 25-29 Marto, kaj poste la grupon en Albany. Ĉar li antaŭe vizitis Aŭstralion, ni denove montris al li la belajn scenojn ĉirkaŭ Perth. 26 Marto liganoj gastigis lin ĉe la Ligĉambroj. Vespere li salutis la multajn klubojn, kiujn li vizitis en pasintaj monatoj.

S-no Ruth McGrath estas la unua gajninto de la Norma Supera Diploma. Ŝi meritas elkoran aplaŭdon, ĉar ŝi estas tre okupata hejme, kiel edzino kaj patrino, kaj en la Okc. Aŭst. Ligo, kiel vicprez. kaj instruisto.

● BRISBANE: Post tri jaroj la Brisbana Societo denove havas urb-centran kunvenejon—ĉe Martin Chambers, George Street, apud Roma Str. Stacidomo: kunvenoj okazos la duan kaj kvaran lundon en ĉiu monato, je la oka horo.

Ni festis la ekokupon per propaganda-vespero kaj ekspozicio.

La jarkunveno okazis 8 Apr.; la sola ŝanĝo en la Estraro: s-ro J. Matzner, nove veninta de Aŭstrujo, anstataŭas s-ron Littleton ofice de dua vicprez.

Propono ke la Societo honorige donu Dumvivan Membrecon al f-no E. B. Carrick pro ŝia multjara fidela laboro por la Societo kaj por la movado ricevis unuaniman aprobon.

Dum la vizito de s-ro Hawks, ge-sroj Mills kaj Behncken gastigis iin ĉe vespermangoj, kaj s-no Fraser en sia aŭto faris 100-mejlan rondvojaĝon kun li por montri vidindaĵojn de Brisbane.

S-no P. DeCleene, Nov-Zelandano, vizitis Brisbanon 23 Apr. survoje al Japanujo. Gastigis ŝin f-no Carrick, kaj en la vespero kelkaj sam-oj venis al la hejmo de la UEA-delegito por ŝin saluti. De 1950 ĝis 1953 s-no DeCleene prelegvojaĝis tra Skandinavio kaj parolis nenium lingvon krom E-o. Ŝi rakontis, ke en Eŭropo oni nomas ŝin "la vaganta avino". La "Brisbane Telegraph" intervjuis ŝin kaj artikolo pri ŝi aperos en "Woman's Weekly".

● ADELAIDE: 7 Marto sam-o Gerhard Schikorsky el Hamburg vizitis Adelaide sur la m.ŝ. Ravenstein, kie li oficas administrate kaj radiiste. Bonvenigis lin ĉekaje ge-sroj Fidge, kiujn en sia kajuto Gerhard regalis per bongusta Germana biero. Vesperrango ĉe la Fidge-a hejmo kaj interesa babilado. Afabla homo kaj arda E-isto, Gerhard bedaŭras mankon de parolekzerco dum vojaĝoj. Tamen en lia kajuto abundas E-a legmateriale. Li ne ŝatas Aŭstraliajn cigaredojn. S-ro Fidge eksperimente prezentis al li Capstan-cigaredon sed la kompatinda preskaŭ sufokiĝis je la unua ensuĉo.

27 Apr. s-ro Jose, returnvojaĝe al Perth, pasigis vesperon kun lokaj sam-oj ĉe la hejmo de f-no Hodge. Ankoraŭ lernanto, li entuziasmas pri la lingvo... li estas bonakiro por la klubo en Perth.

● SYDNEY: Filmoj pri Nederlando estis montritaj dum nia amuzvespero de februaro. Ni vidis nederlandajn farmbienojn, florojn kaj la batalon kontraŭ la maro. S-ano Fritz Mueller-Sorau parolis pri "Spiritismo" (14.2.) kaj Grace Barlow prezentis interesan prelegon pri la poemaro "Kontralte" de Marjorie Boulton.

28.2 okazis la jara ĉefkunveno. La nova estraro: Prez. s-no Grace Barlow; Vic-Prez. S-roj F. Mueller-Sorau, Matasin, Chandler; Sekr. (per-

vizore) Edna Dash; Kasisto: s-no E. Cooke, Biblioteko: F. Smith. Laŭ la kasraporto la societo posedas £140. S-no Barlow raportis ke ŝi instruas 60 knabinojn post la lernejaj horoj en la lernejo, kun permeso de la direktorino. Krome ŝi ankaŭ instruas 12 gejunulojn en sia hejmo. S-ro Gueltling, kiu estis vicprezidanto en la lasta estraro, kritikis ke nur unufoje dum la jaro okazis estrarkunveno kaj ke li pro tio ne plu deziras esti estrarano. Li tamen akceptis la volon de la ĉeestintoj regule raportari al "La Rondo".

Novaj kursoj komenciĝis. Lunde en la klubojn (instruas F. Mueller-Sorau) marde posttagmeze en la hejmo de Grace Barlow por gejunuloj kaj vespere por plenkreskuloj (instruas Grace Barlow).

7.3 okazis diskuto, ĉu aŭ ne la societo aliĝu al A.E.A. La klubo decidis ne oficiale aliĝi. (Rim. de AEA Sekretario: Depost la 1950-a kongreso la Sidnejoj delegitoj promesas ĉiukongrese ke la klubo aliĝos "venontjare". Ni do forte esperu ke la 11-a kongreso en Jan. 1958 alportos pozitivan decidon! H.K.)

S-ro Chandler parolis (28.3.) pri la Historio de Arto en Aŭstralio, kaj s-ro Gueltling montris lumbildojn pri Germanio kaj sia vojaĝo al Aŭstralio (6.4.) "La Vojaĝanta Avino," s-no P. De Cleene el Nov-Zelando, estis nia gasto dum la grupvespero de 11/4. Ŝi interese prelegis pri Nov-Zelando kaj pri siaj vojaĝoj tra multaj landoj de Eŭropo kaj Afriko. Ŝi palzis en Sydney survoje al Japanujo, kie ŝi faros prelegvojaĝon. Ges-roj S. Jackson Coleman el Douglas (Isle of Man), vizitis nin je 14/4. S-ro Coleman prezentis sorĉaĵojn, kaj s-no C. rakontis al ni pri sia laboro por la "Folklore Academy" en sia hejmurbo.—VOLO.

● CANBERRA: La jarkunveno okazis 25/2 ĉe Riverside. Malgraŭ malgranda membraro, la financa stato estas bona kaj, laŭ la raporto de la kasistino, la saldo estas nun pli ol £69. La 2-paĝa "KEK - Kuriero" aperis ĉiumonate kaj jam subtenas sin. Ĉef-agado dum la jaro estis la preparlaboroj por la eldono de "Aŭstralia Antologio". Oficisto por la venonta jaro: Prez. H. R. Torr; Vic-Prez. S. Fulop; Sekr. N. Gamble;

Kasisto: S-no J. Torr; Biblioteko: S-no Fulop. S-ro C. Johns afable konsentis denove funkcii kiel kas-kontrolisto.

"Australia Writes in Esperanto" estis la titolo de interesa parolado, kiun s-ano N. Gamble faris 14/3 ĉe kunveno de la Canberra filio de la "Fellowship of Australian Writers". Multaj konataj aŭstraliaj verkistoj ĉeestis, kaj s-ro Gamble klarigis la malfacilaĵojn kaj la preparlaborojn por la "Australia Antologio", kiun la Canberra E-Klubo intencas eldoni kune kun A.E.A. La "Canberra Times" detale raportis pri ĉi-tiu prelego, ankaŭ pri la jarkunveno.

Tre sukcesa aranĝo estis kurso (16-leciana), kiu okazis dimanĉe en la hejmo de s-ro Fulop. Post la kurso okazis ekzameno, kaj Prez. H. Torr prezentis libro-premiojn kaj E-stelojn al la gajntoj, f-ino June Channon, s-ino Fulop kaj s-ro Howell.

Ni ĝojas raportari ke eminentaj s-anoj el Nov-Zelando venis al Canberra. S-ro Ross Robbins transprenis oficon ĉe C.S.I.R.O. kaj lia edzino estas ankaŭ bona E-istino. Li estis ĝis antaŭ nelonge prezidanto de la klubo en Wellington. Eminentaj sciencisto, s-ro Robbins deĵoris i.a. ankaŭ en Kingston, Jamaica, kie li fondis E-klubon. Post kelksemajna deĵoro en Canberra ges-roj Robbins foriris al Nov-Gvineo, kie s-ro Robbins deĵoros ĝis Oktobro.

● MELBOURNE: La ĝenerala kunveno elektis 27/3: Prez.: E. McKenzie; Vic-Prez.: W. J. Drummond; Sekr./Kasistoj: H. M. Cohen kaj f-ino G. Calwell; Bibliotekistoj: s-ino Hill kaj s-ro Tighe; Program-aranĝanto: S. Buret; Raportisto por "La Rondo": s-ro H. Koppel. Laŭ kasraporto de s-ro Cohen, la financa stato de la klubo estas bona.

F-ino Rita van Rijswijk, juna emigranto el Amsterdamo, interese rakontis, 3/4, pri sia hejmlando. La kunveno 17/4 staris sub la tragika morto de nia ŝatata s-ano Dick Latimer. Post minuto da silento, s-ro Koppel rakontis pri la kara mortinto, kaj s-ino Koppel laŭtlegis la adiaŭajn vortojn de s-ano W. Chandler dum la kremacio. Samvespere s-ro Koppel recenzis la ĵus eldonitan

libron "The Country Upstairs", de la aŭstralia verkisto Colin Simpson, kiu temas pri vizito al postmilita Japanujo. Malofta parolanto estas nia ŝatata Ken Linton, sed kiam li parolis (1/5) pri "Fenomenoj en la Naturo", li kaptis la intereson de ĉiuj aŭskultantoj. La japana konsulo de Melburno pruntis belegajn kliŝojn, kiujn s-ro Koppel prezentis (8/5) kiel daŭrigan prelegon al sia antaŭa recenzo de la libro pri Japanujo de s-ro Colin Simpson. Nia prezidanto (s-ro McKenzie) parolis (15/5) pri diversaj veturiloj tra la jarcentoj. S-ro Tighe, nova tre aktiva ano, rakontis el la vivo de Grafo Tolstoj (29/5) kaj samvespere s-ro Hill parolis pri la libro "Gardu lin, mia lando".

RENDEVUO: En la februaro kunveno de la Melburna Rendevuo, s-ino E. Hill prelegis pri Port Lincoln, kie ŝi feris dum Kristnasko. Pri la vivo de Buddha, Cezaro, Sir Isaac Newton kaj Johann Strauss parolis s-ro H. Koppel en la marta kunveno. En aprilo s-ro S. Bursztin interese prelegis pri la deveno de multaj anglaj vortoj. Ĉiam interesaj estas la prelegoj de s-ro E. Hanks. Same estis lia prelego en Majo, kiam li diskutis la temon de "Decimala Monstistemo" por Aŭstralio. Evidentiĝis ke la aŭskultantoj 100 procente konsentis kun la parolito, ke Aŭstralio nepre devas sekvi la ekzemplon de aliaj ŝtatoj kaj enkonduki decimalan monstistemon.

S-ANO JACK HAWKS REPREZENTOS A.E.A. EN MARSEILLE.

S-ano Jack Hawks, eksprez. de la Okcident-Aŭstralia E-Ligo en Perth, reprezentos oficiale nian asocion ce la 42-a U.K. en Marseille. Li forlasis Perton komence de februaro vizitis s-anojn en Adelaide, Sydney kaj Brisbane, de kie li, per nederlanda ŝipo, forveturis al Singapore. Survoje en Djakarta li estis gastame akceptita en la hejmo de s-rino Datoe Toemenggoeng. En Singapore nia membro, la aŭstralia komisiito, s-ano Ralph Harry, gastigis s-ron Hawks dum kelkaj tagoj. S-ro Harry fondis malgrandan, sed vere internacian E-grupon, al kiu apartenas angloj, ĉinoj kaj aŭstralianoj. Ili ĝojis pri la ĉeesto de s-ano Hawks. De Singa-

pore al Hong Kong Jack ĝuis la vojaĝon en la kunesto de la internacie konata E-isto Wong-Kenn. Post kelkaj tagoj en Hong Kong, s-ano Hawks prenis alian ŝipon al Japanujo, kie li alvenis je 20/4. E-istoj atendis lin en la haveno de Kobe, kaj la sekvontan tagon li atingis Nagoya per fervojo, kie li partoprenis kongreson de E-grupoj de la Nagoya regiono. En Kobe kaj Nagoya li estis intervjua de ĵurnalistoj. Post mallongaj vizitoj al Osaka, Okayama kaj Tokyo, li forlasis Japanujon la 2-an de Majo, per ŝipo "Hikawa Maru", survoje al Usono kaj Kanado. (Elĉerpita el leteroj de s-ro Hawks al H.K.)

11-A TUT-AŬSTRALIA ESPERANTO-KONGRESO.

Leteradreso: Box 2122T, Elizabeth St., Melbourne. Dato: 2a ĝis 8a de Januaro 1958.

Kotizoj: A.E.A. membroj 25/- (ĝis 1/8/57), post tiu dato 30/-; personoj kiuj ne estas membroj de A.E.A. pagas 5/- pli. Subtenantoj: laŭ libervolaj donacoj; ne-partoprenantoj: 10/-; Blinduloj: senpage.

Plaĉas al ni raporti ke la sekvantaj elstaraj personoj akceptis la Honoran Patronecon de la kongreso:

S-ro Roy Rawson, M.L.K. por Viktorio.

S-ino Ruby F. Hutchinson, M.L.K. por Okcidenta Aŭstr.

S-ro Ralph L. Harry, Aŭstralia Komisiito en Singapore.

La Kongres-Komitato decidis honorari s-anon W. J. Drummond (Melbourne) pro sia pli ol 50-jara aneco al la E-movado kaj elektis lin kiel "Honoran Kongresanon".

Unua Listo de Aliĝintoj:

1. S-ro R. R. Rawson, Upwey-Vik. (Honora Patrono)
2. S-ro Ralph L. Harry, Singapore (Honora Patrono)
3. S-ino Ruby F. Hutchinson, Perth (Honora Patronino)
4. S-ro W. J. Drummond, Melbourne (Honora Kongresano)
5. D-ro Fred Williams, Melbourne (Subtenanto, £5/5/-)
6. S-ino E. Williams, Melbourne
7. S-ro Herbert Koppel, Melbourne (Subtenanto, £2)
8. S-ino Fay Koppel, Melbourne
9. S-ro Ken Linton, Melbourne
10. F-no G. Calwell, Melbourne

11. S-ro S. Bursztin, Melbourne
12. F-no Amy Godfrey, Melbourne
(Subtenanto, £2/10/-)
13. S-ro E. McKenzie, Melbourne
14. S-no M. McKenzie, Melbourne
15. S-no E. M. Hill, Melbourne
16. S-no O. Glennie, Melbourne
17. S-no A. C. Hintze, Melbourne
18. S-ro H. M. Cohen, Melbourne
19. S-ro Stan Milligan, Melbourne
20. S-no M. Herman, Melbourne
21. S-no I. M. Cahill, Melbourne
22. S-ro Frank Taylor, Albury
23. S-no A. E. Taylor, Albury
24. S-ro N. F. Gamble, Canberra
(Subtenanto, £1/10/-)
25. Pastro C. C. Cowling, Lismore,
Vic.
26. S-ro I. T. Maddern, Moc, Vic.
(Subtenanto, £2)
27. F-no L. Samblebe, Melbourne
28. F-ino V. Newnham, Melbourne
29. S-ro F. G. Wall, Violet Town,
Vic.

Kongresa Literatur-Konkurso.

La Kongres-Komitato akceptis proponon de s-ano F. Mueller-Sorau (Sydney) aranĝi "Literaturan Kongres-Konkurson". La plej bona rakonto (angle "short story") ricevos premion de £5/5/-. La rakonto estu ne pli longa ol 2,000 vortoj kaj ĝi devas atingi la komitaton ĝis la 1-a de Nov. 1957. Se pli ol 3 verkoj estos ensenditaj, la dua plej bona verko ricevos premion de £2/2/-; okaze de pli ol 10 verkoj estas krome 3-a premio en la valoro de £1/1/-. Ĉiuj premiitaj verkoj estos laŭlegotaj dum la kongreso.

Ni esperas multnombrian partoprenon flanke de niaj verkemaj s-anoj.

Verkojn sendu, laŭeble maŝinskribitajn, al Box 2122T, Elizabeth St., Melbourne.

Kongresanoj: Rezervu viajn hotelĉambrojn TUJ: Skribu aŭ rekte al "The Victoria", Little Collins Street, Melbourne, aŭ mendu viajn ĉambrojn pere de la Kongres-Komitato. (Ambaŭkaze aldonu £2 deponmonon).

Make cheques payable to: "Austrian Esperanto Congress" (and include exchange).

NI KORE DANKAS.

La kasisto, K. Linton, nome de ni ĉiuj, dankas al du samcelanoj kiuj grandanime donacis al nia asocio. La

unua, kiu deziras resti anonima, la duan fojon ĉi-jare donacis kvin pundojn; kaj la alia, S-ro J. Glier, donacis tri pundojn.

DICK LATIMER FORLISIS NIN POR ĈIAM.

En nia lasta n-ro ni raportis pri la granda bato kiun A.E.A. ricevis pro la morto de nia komitatano "Dick" Latimer. Li havis akcidenton per motorciklo, la 5-an de aprilo kaj mortis la 7-an de aprilo en Parramatta hospitalo. Nia antaŭa informo ke li estis fraŭlo estis erara; li estis edzo kaj patro de ĉarma filino, ambaŭ nun loĝantaj en Perth.

La 10-an de aprilo okazis le kremacio kaj oni funebriis lin per marmejaj honoroj. Estis marmea ceremonio ĉe kiu ordinare organizoj ne rajtas partopreni, sed ĉar Dick estis fervora E-isto, oni rompis la regulon kaj, en la ĉeesto de 6 Sidnejoj s-anoj, permesis al ni fari mallongan paroladon. Efektive ni faris historion. La pastro anoncis dum la ceremonio ke kun la permeso de la Komandanto de la Aerstacio, li faros tion kion neniam oni faras ĉe tiaj okazoj, nome inviti eksteran organizon partopreni marmean funebbron. S-ano Wren Chandler diris:

"Gesamideanoj: Niaj koroj estas pezaj dum ni staras ĉi-tie por adiaŭi unu el la plej fervoraj E-istoj kiuj iam aliĝis al la movado en Aŭstralio. Vere kaj sincere li amis nian karan lingvon kaj liaj agoj por la movado estis mult-multaj.

"Li estis komitatano de la Aŭstria-E-Asocio kaj ne nur nome, vere li faris multon por ĝi. Li estis Diplomito de la Brita E-Asocio, Delegito de Universala E-Asocio kaj fervora membro de S.A.T., la laborista E-organizo. Li posedis grandan bibliotekon de E-libroj kaj, kio estas pli grave, li legis ilin kaj plejofte. Li poste donis ilin al aliaj s-anoj.

"Kiam li falis viktimo de kruela sorto, li estis survoje por viziti E-istajn amikojn kaj por ĉeesti E-kunvenon. Li deĵoris ĉe la marmea stacio ĉe Nirimba nur 4 monatojn, tamen li jam aranĝis fondi E-grupon tie. Tra tuta la mondo li havis korespondantojn kaj mi certigas al vi ke li estis fidela korespondanto.

"Ne nur kiel E-isto sed kiel homo

li estis grandanima. Malgrandstatura li estis, sed batis en lia korpo vere granda koro. Li vivis tre altmorale, mi estas certe ke neniam en sia vivo Dick faris malgrandaniman agon. Neniam li faris ion pri kio li dubis la justecon. Li estis honesta, sincera, sindonema kaj kviete donacema homo. Li estis varmkora amiko, ĉiam preta helpi tiujn pli malfeliĉajn ol li. Ĉe la hejmo por malhelhaŭtaj infanoj en Bomaderry li estis amegata kiel 'Onklo Dick'.

"Sincera Kristano li estis. Eĉ tiuj kiuj ne simpatiis al liaj idealoj devis saluti lian sincerecon.

"Adiaŭ Dick, Samideano tre estimata. La Esperantistoj, ne nur de Aŭstralio, sed de tuta la mondo bedaŭros vian foreston. Se en la vasta profundejo de Eterneco estas Esperanto-angulo, tie vi atendos nin!"

Oni invitis la partoprenantajn Sidneajn s-anojn traduki ĉu-supran prelegon por la gazeto de H.M.A.S. Albatross. Do, per siaj agoj por la movado, s-ano Dick Latimer penetris eĉ la ceremonian muron de la Reĝina Aŭstralio Mararmeo. (laŭ informoj ricevitaj de Grace Barlow kaj Wren Chandler, Sydney).

WORLD CLIPPINGS.

SPAIN. — Government Gazette, "Documenta", organ of Tourism, Dec. 27, contains a detailed and favorable report on the Spanish Esperanto Federation.

BULGARIA. — "Nuntempa Bulgario" gleaned 3900 subscriptions from 34 countries. The printing of 4000 copies was not enough to meet the demand. Address: Ilevsky Str., Sofia. 32 p. a month; 9/- a year.

The Bulgarian Academy of Sciences officially supports Esperanto (Dec., 1956). Full text of document in "Heroldo de Esp-o", March 1.

State publishers will issue in Esperanto — "Sub la Jugo," by Ivan Vazov.

POLAND.—The Esperanto Assoen. sold 25,000 copies of various publications. A beautifully bound 3-vol. edition of "La Faraono" (B. Prus; trans. K. Bein); in preparation are a textbook and two dictionaries. The review "Pollando" is issued every month, and Sienkiewicz's "Quo Vadis" (2nd edn.) and other works in press.

VIETNAM.—82p. E-textbook is on sale. Central organ of the Vietnam labor-youth movement, in 10,000 copies, published over four pages on "What is Esperanto?" En Hanoi 400, in five courses, are learning Esp-o, some in readiness for the Moscow Festival of Youth.

AUSTRIA.—The German Institute of Pedagogic Sciences, Salzburg, has published a 3-vol. technical work in which Prof. Dresselhaus gives a documented study on Esperanto.

Esperantists have bought a bus, for excursions, meetings and mobile exhibitions.

GREECE.—Archbishop Markarios when in exile replied with Esperanto words to J. P. Kaloumenos, an E-ist in Athens. Journal "I Vradini" reproduced the text with Greek translation. The Ethnarch favors an int. lang.

ISRAEL.—Prof. Kohen-Cedek and Mr. Sekelj interviewed Mr. J. Ben-Cvi, President of Israel, on Esperanto. The latter said: "Official circles are sympathetic to your efforts. It is, however, at the moment not possible to introduce Esperanto into the work of our State, but when there is accord among the other States Israel will not lag behind in this matter. When it is discussed in a competent convention with respect to its introduction, rest assured we shall be favorable. In the meantime teach and diffuse it among the people."

CHINA.—According to Czech bulletin the Chinese E-League has five paid officials. A new textbook, based on the Czech of Prof. Kilian, is in preparation.

HUNGARY. — In spite of the tumult, Esperanto groups are active. Budapest Radio, Jan. 24, broadcast work plan of the National Esperanto Council. The chief party gazette announced Feb. 1 that radio-station Petofi will give weekly Esp. information. Pupils in many schools may choose Esp-o as an optional foreign language; only lack of Esp. teachers inhibits wider advantage being taken of this, as only a teacher in the school concerned may teach it. "Verda Ĉaro" theatre group, under J. Baghy, presented Apr. 20 "Nora" (Ibsen) in full. This, after a successful "Pygmalion".

The Postal Administrator has promised to issue two Esperanto stamps for the 70th anniversary of the appearance of the first Esperanto textbook—one with portrait of Zamenhof. Articles on Esperanto have recently appeared in important newspapers. Youth review (27/2) ran a detailed article on "Do you speak Esperanto?"

ITALY.—Camp for Hungarian refugees at Calabrone learns Esperanto. At Bari trade fair professor invited by organisers gave talk on Esperanto at fair opening.

ICELAND.—Mag. "Birtingur" had article on Esperanto literature with translations.

JAPAN.—"American Esp. Magazine" (3.57) contains long article on use of Esperanto in medical science, with special attention to Japanese medical publications and practice.

English-language newspapers gave much publicity to Golden Jubilee of Japanese Esperanto movement.

BRITAIN.—Royal Society of Arts reports that in its examinations 1955-56 Esperanto ranked fifth in number of candidates, after French, Spanish, German and Italian. 73 took the Esperanto examination.

HOLLAND. — Internal Revenue Employes paper gives lessons in Esperanto.

Utrecht City Council finances two classes for Esperanto teachers.

DENMARK.—Incomplete statistics give 36 Esperanto classes in 15 cities—494 students.

BELGIUM.—The Army "Aggressor" unit uses, like its U.S. army counterpart, Esperanto in its manoeuvres.

BRAZIL.—Largest national Esperanto organisation in the world celebrated its 50th anny. in July.

"AUSTRALIA WRITES" IN ESPERANTO.

"Perhaps the most important item considered at the week-end conference of Esperantists from Sydney, Nowra, Melbourne and Canberra in Mittagong, N.S.W., during May, 1956, was the proposal for translation of an appropriate Australian book into Esperanto before the next Australian Esperanto Congress in January, 1958, when consideration could be given to

its publication. It was agreed unanimously that Esperantists throughout Australia should be invited to contribute."

The above is an extract from the Canberra Club monthly "Courier" of June, 1956, and subsequent issues (available for the cost of postage) handled questions arising in connection with the Anthology. Over 20 articles from the Fellowship of Australian Writers short-story collections—"Australia Writes" and "Australian Signpost"—are being translated by Australian Esperantists from all mainland States. There are still one or two stories, however, that need translation to achieve a balanced selection. Write to Noel Gamble, 27 Froggatt St., Turner, Canberra. The "Courier" is being sent overseas. Writes a B.F.A. member:

"Mi tre ŝatas la ideon de niaj Aŭstraliaj sam-oj, kaj esperas, ke tiu ideo pri antologio brile efektiviĝos. Antaŭ ol atingi tiun celon, necesos pluraj tre kompetentaj tradukantoj kaj multe da pena laboro. Sed la celo valoras la laboron."

KONSILO KAJ KONSOLO.

Vasta estu via vido,
multeflanka via vivo;
penoplenaj viaj jaroj
de honestaj, strebaj faroj;
planoj: provoj planojn kovas—
vi sukcesas, se vi povas.
Tradiciojn vi honoru,
modernajojn ne ignoru!
Kun seren' kaj puraj celoj
migras vi tra multaj mejloj!

Goethe: trad. K.J.H.

STELO — 7½p.

Eldonistoj! Uzu la stelon por indiki la prezojn. La UEA-jarlibro donas kurztabelon de la "stelo". Stelo valoras 6 pencojn en Britujo kaj Nov-Zelando; 7½p. en Aŭstralio; 0.07 dol. en Usono k.t.p. Bonege klara sistemo.

"NUNTEMPA BULGARIO."

La redakcio de "N.B." volonte prezigos senpagajn anoncetojn pri korespondado. Sendu al: Nuntempa Bulgario, Ilevsky St., Sofia.

—S. H. Grant (Port Lincoln).

La Ronda

The Australian Esperanto Monthly

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Jarkotizo: 12½\$ (aŭ 20 respondkuponoj).

Anoncoj: Tri linioj: 4\$.



Redaktoro: F. R. BANHAM, 2 Banchory St., Essendon, W.5, Victoria.

Adreso de A.E.A.—Box 2122T, P.O., Elizabeth Street, Melbourne.

Kasisto: K. Linton, 11 Poplar Street, South Caulfield, S.E.8.

Vol. 11, N-ro 78.

MELBURNO.

Jul. - Aug., 1957

Australia Kroniko

● **SYDNEY:** S-ano F. Mueller-Sorau prelegis (2.5) pri sia vajaĝo al Nev-Zelando. Samvespere ni bonvenigis s-anon Milan Sudec (el Zagreb), kiu fuĝis el Jugoslavio en 1956, kaj s-anon Zulbey el Brisbano. Je la maja amuzvespero, s-ro O'Grady parolis (angle) pri la lingvoj de la aŭstraliaj indiĝenoj. Prelegon faris s-ano Sudec (16.5) pri la jugoslava E-movado kaj pri la personeco de D-ro Ivo Lapenna. S-ano Gueltling gvidis (23.5) la "Leterkeston" kaj je 30.5 s-ino G. Barlow disaŭdigis sonrubandon, kiun ŝi sendos al Hispanujo.

S-anino Macey prezentis dum la junia amuzvespero lumbildparoladon pri sia lastjara vojaĝo tra Europo. Pri ferioj en urbo Broken Hill parolis, 20.6, nia sekretariino Edna Dash kaj s-ano Chandler (27/6) pri Kavernoj en orienta Aŭstralio. Novalveninto el Svedio, s-ano Ive Fjull, vizitis la klubon 3.7, kaj je 6.7 ni vidis interesan filmon pri Hindujo.

Niaj mondvojaĝantoj ges-roj Rutland revenis el Europo post 2½-jara vojaĝo. Je 18.7 s-ano Rutland raportis pri siaj spertoj per E-o dum tiu vojaĝo. Li renkontis proks. 500 E-istojn en 20 landoj. "Teknika Desegnado" estis la temo de preleĝo de s-ano Gueltling je 25.6.—VOLO.

Korekto: En mia lasta raporto enŝteligis 2 eraroj, kiuj donas alian sencan al la teksto. Unue, mi ne kritikis, ke nur unu estrarkunveno okazis, sed ke NENIU estrarkunveno okazis. Due, sub dato 7.3 estas skribita, la klubo decidis ne oficiale aliĝi. Tio signifus, ke la klubo decidis aliĝi, sed ne oficiale. Sed fakte ja la klubo decidis TUTE NE aliĝi!—VOLO.

● **HOBART:** Nia klubo progresas bone. Ni havas 24 fervorajn membrojn kiuj regule vizitas la klubkunvenojn. Nur kelkaj el ili kapablas konversacii en E-o, sed ni pli kaj pli enkondukas E-paroladojn en la kunvenojn. Nia prezidanto, s-ro Leereveld, prelegis pri Esperanto ŝe "Fahan School", kiu en debato ĉe UNO-forumo, subtenis jese la temon "Ĉu neŭtrala aŭ internacia lingvo estas dezirinda?"—G.E.L.

● **MELBOURNE:** Ĉiun unuan merkredon en la monato, s-ro Linton donas prelegon pri gramatikaj malfacilaĵoj al kiu sekvas kutime alia preleĝo. S-ro Cohen parolis pri "Desegno de Suoj" (5/6), Amy Godfrey pri "Leteroj de venecia komercisto en la meza epoko" (12/6) kaj s-ro Bursztin pri la psikologo Alfred Adler (19/6 kaj 3/7). Prelegon faris ges-roj Milligan je 26/6. Dum s-rino

THE ESPERANTISTS OF MELBOURNE
EXPECT YOU FOR A GLORIOUS CONGRESS!

Mail your Congress Fee now and reserve your accommodation.

Address all enquiries to A.E.A., Box 2122T, Elizabeth St., Melbourne.

Milligan priskribis ferian vojaĝon al kaj tra Suda Aŭstralio, s-ro Milligan montris belajn, memfaritajn lumbildojn kaj projekciis sur la ekranon de tempo al tempo landkarton por montri la vojon de sia vojaĝo. La anaro aplaŭde gratulis niajn tiel aktivajn ges-anojn.

Regula programero estas ĉiumonata prelego de s-ro H. Koppel, "Novajoj el Esperantujo"; same li faris je 19/6 kaj 10/7. S-ro E. McKenzie prelegis (10/7) pri la "Indiĝenoj de Aŭstralio" kaj je 24/7 s-ro Fridenbergs pri "Tradukmaŝinoj" kaj ilia neebleco anstataŭi nian karan lingvon.

14/8 okazis la ĉi-jara "Amerika Teo". Anoj devas alporti donacojn, kiuj estas vendataj en bazaro. Pli valoraj varoj estas lotumitaj aŭ aŭkciiitaj kaj teo kun kukoj estas vendataj al la ĉeestantoj. La rezulto estis enspezo de £21-17-0; duono iras al la kaso de la Melburna E-Klubo kaj la alia duono por subteni La Rondon. Sed, ĉar La Rondo estas tutaŭstralio organo kaj postulas la subtenon de ĉiu aŭstralio E-klubo, Melburnanoj prave atendas ke ĉiuj aliaj E-kluboj en Aŭstralio ankaŭ aranĝos ĉiujare similan vesperon. Dum ĝi helpas la financojn de la loka klubo, ĝi ankaŭ donos al ĉiuj la senton de tutlanda solidareco.

RENDEVUO: Malofta preleganto estas s-ano E. Hearne, kiu en Junio alparolis la Rendevuanojn. Li priskribis aventur-riĉan aŭtomobilvojaĝon de Melburno al Perto, per tendo, tra la Nulabor-dezerto. Fakte li ne atingis (dum la prelego) Perton, sed pro tempomanko devis interrompi sian prelegon "kvazaŭ en la mezo de la dezerto", sed li promesis daŭrigi aliĵoj. Per grandega landkarto li montris al ni la vojon kiun li sekvis.

Ni ĝoje bonvenigis novemigrinton al Aŭstralio. S-ano Ilja Grahovac, aktiva E-isto el Beograd, alparolis nin en Julio, kiam li priskribis detale sian hejmlandon Jugoslavujon.—H.K.

S-ro Stan Milligan estas la landa reprezentanto de la "Skolta Esperantista Ligo" kaj li invitas skoltojn aŭ skoltinojn kontakti lin. Li eldonas de tempo al tempo specialan, skoltan bultenon "Aussie Write-Up", kiun li volonte sendos al geskoltoj aŭ iamaj geskoltoj kontraŭ reafranko. Lia adreso: 274 Mont Albert Rd., Surrey Hills, E.10, Vic. Jarabono al "Skol-

ta Mondo", presita organo de "Skolta E-ista Ligo": 2/9 jare.

Ŝanĝo de A.E.A. - Regularo

S-ano V. Gueltling, en la nomo de kelkaj membroj en Sydney, deziras anonci ke laŭ paragrafo 19 de la AEA-Statutoj, li proponos ŝanĝon de ĉi-tiu regularo dum la 11-a Aŭstralio E-Kongreso. En longa letero al nia sekretario, li klarigis ĉiujn ŝanĝojn, sed ĉar publikigo estus tro spacoraba, ni aldonos al estaŭta eldono de "La Rondo" liajn ŝanĝ-proponojn en hektografita formo.

11-A AŭSTRALIA ESPERANTO-KONGRESO.

Aliĝojn sendu al Box 2122T, Elizabeth St., Melbourne. Date: 2-8a Jan. 1958. Kotizoj: A.E.A. membroj 30/-, ne-membroj de A.E.A. 35/- Subtenantoj: laŭ libervolaj donacoj.

2-a Listo de Aliĝintoj:

31. S-ino J. Milligan, Melbourne
32. S-ro W. C. Andres, Adelaide
33. F-ino V. Cox, Melbourne
34. S-ino J. Torr, Canberra
35. S-ro I. Grahovac, Melbourne
36. F-ino J. C. Kempson, Belalie North, S.A.
37. S-ro F. R. Banham, Melbourne
38. S-ino H. Banham, Melbourne
39. S-ro A. L. Brentwood, Melbourne
40. F-ino E. Styles, Rosebud, Vic.
41. F-ino R. van Ryswyk, Melbourne
42. S-ro S. L. Parry, Brisbane
43. S-ro K. Hirschel, Melbourne
44. S-ino Ruth McGrath, Perth
45. S-ro Hugh McGrath, Perth
46. F-ino E. M. Bull, Perth
47. S-ino C. Fierenzi, Melbourne (Subtenanto £3/15/-)
48. Toni Fierenzi, Melbourne
49. Paul Fierenzi, Melbourne
50. S-ro Tibor Sekelj (vojaĝanta UEA-komitato)
51. S-ino G. Barlow, Sydney
52. S-ro R. Ahrens, Moroco W., N.S.W.
53. S-ino A. S. Sedgley, Perth
54. S-ro E. W. Chandler, Sydney
55. F-ino E. Dash, Sydney
56. F-ino M. Day, Port Moresby, N.G.
57. S-ro E. W. Crowe, Melbourne
58. F-ino F. Smith, Sydney
59. S-ro V. Gueltling, Sydney
60. S-ro F. Mueller-Sorau, Sydney
61. F-ino A. Longson, Perth
62. S-ro M. Leereveld, Hobart

63. S-no A. Leereveld, Hobart
64. S-ro F. Dash, Sydney
65. S-ro G. Scarini, Sydney
66. S-ino E. Cooke, Sydney
67. S-ro C. Winchcombe, Adelaide
(Subtenanto £3)
68. S-ro J. Kew, Melbourne
69. F-ino W. Addis, Adelaide
70. S-ro J. Matasin, Sydney
71. S-ino J. Matasin, Sydney
72. F-ino E. Proctor, Launceston,

Kongresa Konkurso: La plej bona rakonto (ĝis 2000 vortoj) ricevos premion de £5/5/- 2-a premio £2/2/-; 3-a premio £1/1/- . Sendu verkojn ĝis 1.11.57 al A.E.A.

Kongresanoj: Rezervu viajn hotelĉambrojn TUJ: Skribu aŭ rekte al "The Victoria," Little Collins Street, Melbourne, aŭ mendu viajn ĉambrojn pere de la Kongres-Komitato. (Ambaŭkaze aldonu £2 depononon).

Kelkaj malmultekostaj ĉambroj estas ankoraŭ haveblaj ĉe Y.M.C.A., se vi TUJ mendos!

LIBERA FORUMO.

Vivu la "Hoboj"!

En la lasta n-ro de "La Rondo" KOHERO plendas ke A.E.A. uzas—imagu!—du paĝojn de sia oficiala organo por klubraportoj, ke "Hobo" vizitis klubon, ke s-anoj partoprenis Zamenhofan Feston. Al ĉi-tiu plendo mi nur povas respondi: "Vivu la "Hoboj"! Kaj mi nur bedaŭras ke en Aŭstralio ne ekzistas, 1,000 "Hoboj", anstataŭ nur 180, ĉar ju pli granda la nombro de "Hoboj", despli granda estus nia landa E-gazeto kaj despli grandan spacon ni volonte disponigus al niaj literatur-amantoj.

La matematikan problemon de KOHERO mi facile solvas: "pli ol 50" ne signifas 5000, sed ke la raportisto supraj kalkulis kaj trovis ke ĉeestis malpli ol 60, sed pli ol 50 anoj. Sed, se estonte 59 Melburnanoj kunvenos ĉe Zamenhofa Festo kaj KOHERO mem subite sentas honorian Majstron per ĉesto, la raportisto certe raportos ke 60 kunvenis!

Fenomeno en la E-movado estas ke troviĝas en ĉiu grandurbo de la mondo 3-4 bonegaj E-istoj (ĉiam literaturamantoj aŭ gramatikistoj), kiuj neniam, aŭ nur tre malofte vizitas la lokan klubon. Ĉu ili agas tiel pro "intelektala snobismo" aŭ pro

"sento de malsupereco" (kutime ili diras "manko de tempo") ne multe ŝanĝas la fakton ke ili "tronas super la nuboj" kaj tute perdis la kontakton kun la E-ista popolo.

Se KOHERO vizitus la lokan klubon aŭ iun klubon tra Aŭstralio, kion li bedaŭrinde neniam faras, tiam li konstatus ke je la alveno de la plej nova n-ro de LA RONDO, 90%-oj de la anoj tuj serĉas la "Aŭstralian Kronikon" kaj eĉ taksas la gazeton laŭ la grandeco de la klubraportoj.

KOHERO demandas ĉu stagno ekzistas nur ĉe La Rondo? Al tiu demando mi nur konsilas al li preni iun n-ron de "Heroldo de E-o" kaj kalkuli la spacon kiun nia altsatata Teo Jung uzas por raportoj kaj kiom pri la literaturo. Du grandformataj paĝoj (el 4) estas ĉiam dediĉitaj al la movado. Kompari La Rondon kun la "Nica Revuo" estas infanaĵo.

Ni tre bonvenigas iajn konsilojn de KOHERO, kaj la 11a Aŭstralia E-Kongreso en Januaro estu por li unika okazo montri al ni ke li honeste deziras helpi levi la nivelon de E-scio en nia lando. Jen oficiala invito al li partopreni aktive en la literatura programo de la kongreso kaj fari iuspecan prelegon kiu movas sian literaturreman koron.

—HERBERT KOPPEL

(A.E.A. kaj Kongresa Sekretario).

El Letero el Hobart.

"Another problem, personally observed but not uttered, is the difficulty of language (Esperanto) in "La Rondo". None of our people read it, because it is too hard. Good or bad policy? Either way, at least one article in simpler terms may encourage them more!"

RECENZOTAJ.

LA FLOROJ DE L'MALBONO, de Charles Baudelaire. Kompleta poemaro. Redaktis Waringhien kaj Kalocsay. Eldonis J. Regulo Perez, Ap. 25, La Laguna, Tenerife. 400 paĝoj. 2.40 dol. Usonaj.

HOMOJ KAJ RIVEROJ, origin-alaj rakontoj de J. H. Rosbach. Eld. KOKO, Randbolveg 4, Copenhagen F. 140 paĝoj. 12 Danaj kr. Lerte facilflua prozo.

RANDOM REMARKS ON "LA RONDO"

Looking Back and Looking Forward: Editorial Soliloquy.

What We've Done.

It's relatively easy to launch a gazette on the wings of enthusiasm for a lofty ideal; but to sustain it for years on modest means, and maintain its content at a level comparable with that of similar papers in lands of like resources—that's a different tale.

Despite our defects, we have for over 30 years done just this (1). But our enterprise needs steady support, moral and material, and we believe you will give it. What we have done, we can continue to do, notwithstanding the pecuniary claims of our "rising standard" of living—i.e., the mounting tide of gadgetry, large and small.

What Happens If We Don't.

The aims and aspirations, the setbacks and successes, the life itself of Esperantism in Australia, are expressed and recorded in the pages of *La Rondo*, which should be the link to bind our fraternity in common interest, and the voice to inspire and direct it on its march. Without the cohesive and articulatory factors so provided, our small but serviceable organisation would disintegrate into isolated and listless units, of whom many would sink into indifference. Our affiliation with U.E.A. as a national body would be jeopardised—unless the A.E.A. could hold together by roneoed folios the minimum of 160 members necessary to such affiliation.

The Fading and the Fixed.

The years pass, and with them the figures that labored in them. The memory of most will blur into oblivion; but to the eyes of the future the pages of our two organs will stand as fixed testimony to what issues men were moved by the dynamic of a Polish genius operating on receptive minds, not only here but in all the world.

True, alas, some names rocketed across the pages in an access of undisciplined fervor that faded when the novelty wore off and the going grew tough. With faulty strategy and loose tactics they essayed tasks

impracticable by such means. Others, like the eternal flame, fed from a hidden font, glowed steadily through decades, spiting the cheerless winds.

Noblesse Oblige.

To be an Esperantist is a proud privilege, but it brings with it moral obligations. It is a privilege, the possession of which is the more warmly felt as one senses fulfilment of one's duty toward the language. "If I bear the name, I will bear it honorably, and to the limit of my capability I will present it to the world."

No Esperantist should doubt that a good impression would follow his declaiming of, say, *Patro Nia*, or *Ho Mia Kor'*, nor shirk comparison in an oral test with, say, a third-year student of some national language.

Incumbent on us all are these: to perfect our use of the language; to direct that use to practicable ends; to project into society, at all points open to us, knowledge of the marvellous medium entrusted to us.

(1) *La Suda Kruco*, 1920-34; *La Rondo*, 1940

NORMALA ELEMENTA DIPLOMO.

F-ino Alice Longson, de Okcidenta Aŭstralio, sukcesis en tiu ekzameno. Si estas la tria, kiu ricevis tiun diplomon. Ni kore gratulas!

INDNOSSIO.

Ni varme salutas E-an gazeton "Voĉo el Indonezio", Pintu Besi 39, Djakarta. Nia nenumerita, nedatita ekzemplero donas spacon al la vizito de s-ro J. Hawks i.a. interesajoj. Dulingve.

Estas dezirinde, ke ni subtenu ĝin: 5 resp. kuponoj. Ĝi ankaŭ servus al studentoj de la Indonezia lingvo, kun pli kaj pli graviĝas por nia landa politiko.

La jarlibro de UEA donas "Indonezio", kiu formo ŝajne bezonas rekonsideron, ĉar la Indonezianoj ue tiel literumas ĝin.

All articles in this n-r with exception of reports have been cut for space.—Red.

Recenzoj

"ESEOJ I. Beletro." Eld. Stafeto, J. Regulo, La Laguna. 236 p. 15/- Aŭst. plus afranko, ĉe niaj agentoj.

La unua volumo de duoj, kiu estos la plej impresa kolekto de beletro en nia literaturo. Ĝi estas klare-popularigita prezentaĵo de pure-personecaj, propre-ideaĵaj pritaksoj kaj observoj pri temoj aktualaj kaj lingvehistoriaj, krom studoj versteknikaj kaj literaturecaj. Kelkaj eseoj rilatas al ne-Esp-aj aferoj—ekz-e la Origino de la Kiso, cetere ilustrita per trafik verstradukoj; funda analizo de la detektiva romanfarado; Unu Damo kaj Siaj Poetoj, en kiu W. enteksas mirindan tradukon de La Blanka Elefanto.

La aŭtoro prikomentas historiajn kaj profetajn elementojn en la Biblio, negative traktante supozon, ke havas valoron por ni E-istoj iuj tekstoj en Cefanja, kaj en Agoj pri la Pentekosta okazo.

Sekvas subtila studo pri Hamleto kaj ĝia spirita rilato al la moderna detektiva romano; pensriĉaj revoj post legado en Dante, kun surpriza lumjeto sur la originon de la Dia Komedio. Pri la Tradukarto, valora kontribuo al tiu grava okupo.

Pri Preseraroj—obstaklo konstante preme ĝena por E-bibliografoj kaj tekstekspertoj. Teme pri La Lingvistika Valoro de la Poezio, W. riĉe ekzempligas per trafa vortelektoj la elvokivan forton de la vortoj en fraz-kunmetoj, kaj laŭdas Zam-on pro lia ĝenia intuo aparte en tiu kampo: Zamenhof:

En sonĝo konvinkon ricevis,
ke LA, artikolo, ne manku

al la gramatiko Esp-a. Leginte la artikolon, ni sentas, ke Z. posedis, en mistere mirinda grado, ian kapablon, kiu levis lin ĉiele-alten super liaj rivaloj. Ankaŭ al W. mem ne mankas tiu "sentivo": nur amanto de belsoneco instinkte skribus: . . . ne sekan . . . sed sukan . . . ; pure nura.

Siluetoj pri Grosjean-Maupin, Lanti, Helmi Dresen, La Piratoj, kaj Maura; enketo en la naturon de l' humuro kaj sprito.

La verko estas, laŭ la trouzita frazo, nemalhavebla por amantoj de nia lingvo kaj literaturo. Kreis ĝin

homo, kies multkampan klarecon kaj senteman lingvamon ni avide admiras. Tamen, miloj malpli varme laŭdas la mokete amuzan tonon de iuj liaj observetoj pri la Biblio. Sed tio flank-en! Ju pli pozitive ni partoprenas l'an vastampleksan spiriton kaj lian kolosan emon al libere donacata laboro, des pli bone por nia komuna afero.

GRUK, de Kumbel (Paul Hein), trad. Poul Thorsen. 72 p. Prezo 6/6 Aŭst. Eld. Centra Dana E-ista Ligo, Hormarksalle 5, Risskov, Denmark.

Koncizaj, vortjonglaj strofoj plenaj de sprito kaj ironio pri la ĉiutaga kaj mondafera vivo, "grukoj" estas intense popularaj poemminiaturaj ĉe la gazetlega publiko. Preskaŭ 5000 aperis en la Dana ĵurnalo "Politiken".

La paĝoj estas, pro ia kaŭzo, duoblaj, netraĉitaj. Legantoj estas avertitaj ne tranĉi ilin. Ni senscie ja ilin tranĉis, kaj sur ilian ĉastan blankon ni peke penos skribgeneri propre-faritajn grukojn.

Nomi: Paŭlon Hein "ekspONENTO" de Dana humuro ne ŝajnas korekta. La termino estas matematika. Kial ne: montranto, manifestanto, interpretanto, au ekspONANTO? Kumbel simpatie prenas en sin la spiriton de la Dana humuro, kaj per sia krea, trafobserva talento, sintezigas ĝin sub formo de strofoj ĝuste redonantaj ĝin plaĉe al legantoj. La provoj de Thorsen varias inter si laŭ trafefikeco. La plej bonaj estas tre bonaj.

Specimene:

Homoj duspecaj
faras blokadon,
malebligante
korespondadon.
Unu principe
reagon ne montras,
kaj la alia
tro tuje respondas.

★ ★

La dato de koncipo validas
kiel nask-tago inter japanoj.
Sed kiel ili tion decidas
sen monatpaŭzo inter la amoj?

★ ★

Eble tineoj erare konkludas:
Homoj respektas nin laŭde,
ĉar ekvidante tineon salutas
ili per manoj aplaŭde.

EZOPA SAĜO: 77 Fabloj verse reverkitaj de K. Kalocsay. 127 p. 1.30 dol. Eld. KOKO, Rondbolvej 4, Copenhagen.

La destino dekretis, ke Ezopo, Greka sklavo (620-560 A.K.), fariĝu la devenfonto de la fabloj de l' moderna Eŭropo. Finfine respondis mem la kriinto: "Kiel tiujn fablojn oni ne jam de longe tradukis en E-on!" En ĉi tiu volumo li genie kaj sunklare prezentis bukedon en trafte kompakta formo kaj amuza efiko, kiuj elvokas sinceran admiron.

Tie kaj tie montriĝas artifikoj por solvi rimproblemojn, kaj K. uzis neologismojn aŭ neordinarajn vortojn, kie en prozo li verŝajne kontentigis per la kutimaj, ĉiutagaj. Ekz., 108: palavron (Port. palavra) . . . kadavron. 110: centjaroj (anst. jarcentoj) . . . bonfaroj. 113: degnas . . . regnas. ("regni", cetere, en la 4a eld. de F.K. p. 297, kaj supozinde en la pli fruaj, estas preseraro. 18: "La ŝafoj rabi ilin nun nenio jam obstaklis". Kiel klarigi la pleonasman "ilin"? Komparu: Nombroj 23/13. 81: "aĉaj homoj". -aĉ, strikte difinita, havas nenian moralan subtonon, sed nur fizikan (domaĉo) aŭ estetike impresan (parolaĉi). Homaĉo povas esti morale kaj karaktere estiminda persono; kaj domaĉo (ruiniĝinta aŭ malbone konstruita domo)—loko de edifo kaj feliĉo.

Specimeno el havinda verko:

Kokino ĉiutage ovis;
mastrino, ne kontenta, provis
du ovojn havi tage—riĉe
do ĝin nutradis. Trograsige
plu ovi ĝi ne povis.

Paso post Paso: Memrorlibro de la E-Societo en Byeloyar (J. Slavio). Nova leglibro, kaj frapa provo doni literaturan formon la aferoj kaj aspiroj de aktiva E-grupo. Imitinda ekzemplo de kolektiva laboro fare de verkemuloj kaj lingve dotitaj sam-oj. Fotoj riĉigas la libron, kaj diro de Tito favore al nia afero donas akran pinton al la lanco. E-Societo, Vin-koviceva 2, Byellyar, Jugoslavio.

Vagado sub Palmoj: Originalo de Jean Robilliard. Eld. U.E.A., Eendrachtsweg 7, Rotterdam. 10 steloj (6/1½). Vojaĝo tra Okcidenta Saharo. Kun R. Rossetti, ni revas vidi

ĝin tradukita en cent lingvojn, sed sentas, ke neniuj traduko estas pli ol ombro de la originalo. Miriga vortoprezento pri terparto malmulte konata de la cetera mondo.—F.R.B.

FLUA PAROLADO.

"Sur paĝo 165 de La Rondo surprizis min parteto el la raporto de s-ro F. Taylor pri la Universala Kongreso. Ĝi tekstas: 'Ĉu, en la kunvenoj, la estroj devas paroladi tiel rapide kvazaŭ fanfaroni pri sia lerta posedo de la lingvo?'

Ĝis nun okazadis en la Movado, ke homoj kiuj multe laboris kaj sindone dediĉis siajn fortojn al disvastigo de la lingvo, estis kelkfoje proklamitaj 'diktatoroj' aŭ simile. Okazadis ankaŭ, ke ju pli iu persono povis atingi por nia komuna afero, des pli da jaluzoj kaj envioj li elvokis en kelkaj medioj de la Movado. Tio estas nenio nova. Tiun sorton ĝisvivis multaj sindonaj batalantoj, komentante kun Zamenhof kaj finante kun la pioniroj de niaj tagoj. Sed, laŭ mia scio, ĝis nun ankoraŭ ne okazis, ke iu riproĉis normale fluan lingvouzon kiel 'fanfaronadon pri sia lerta posedo de la lingvo'. Ne nur la 'estroj', sed ĉiu esperantisto devus posedi Esperanton tiel, kiel li posedas sian nacian lingvon.

"Sekve, ĉiu devus paroli Esperanton tiel flue, kiel li parolas sian nacian lingvon. Tio okazas nur, se oni daŭre praktikas la lingvon. Tiurilate ne ekzistas diferenco inter la 'estroj' kaj ordinaraj esperantistoj.

"Dum la universalaj kongresoj—kaj ankaŭ en diversaj aliaj okazoj, ekzemple dum ordinaraj sociataj kunvenoj kaj ankaŭ en konversacioj ekster la kunvenoj—mi rimarkis, ke tiuj, kiuj praktikas la lingvon, parolas ĝin flue. Male, tiuj, kiuj neniam praktikas ĝin, sed parolas ĉiam naci-lingve, neniam povas atingi la necesan fluecon. Se iu estas riproĉinda, tiam, laŭ mia opinio, estas riproĉindaj la eternaj komencantoj, kiuj pro sia malalta lingvonivelo ĝenas la disvolviĝon de la debatoj, brem- sas la evoluon de nia literaturo kaj ĝenerale malhelpas la progresadon de Esperanto. Se oni riproĉas, ke iu parolas tro rapide, mi kuraĝas respondi, ke tio ne estas ĝusta. Estas precize la malo: oni aŭdas tro mal-

rapide!

"La supraj linioj neniel koncernas s-ron Taylor, kiun mi alte taksas. Temas nur pri principa demando.

—IVO LAPENNA.

La Tradukanta Maŝino.

Kiel facile teknikuloj, speciale se ili estas samtempe militistoj, solvas problemojn, oni povas legi en Readers' Digest (5/57), kie brigada generalo D. Sarnoff priskribas inventojn jam en preparo, interalie pri elektrona tradukmaŝino, kies teknikajn detalojn jam ellaboris teknologia instituto en Massachuset.

"Unu tagon ni havos maŝinojn kiuj tuj, ekzakte - korekte tradukos unu skribitan lingvon en alian. Ekz., teksto en la angla lingvo sur speciala klavaro estas kondukata al elektrona kesto simila principe al la nuna giganta kalkulmaŝino, nur multe malpli granda. La funkciisto nur metas montrilon sur diskon selektantan diversajn lingvojn, kaj la teksto estas aŭtomate skribita, tradukite en la deziratan lingvon per alia maŝino".

Similaj sciigoj aperis jam antaŭe en la ĵurnaloj, sed ĉar ili estis anonimaj kaj iom fantastaj, oni ne atentis ilin. Sed nun imprese parolas ja generalo kaj konata inventisto! Li daŭrigas, ke oni preparas projekton pri aŭtomata traduko de parolata lingvo. "Ekz., koreano povos telefoni Londonon en sia lingvo, kaj ĉi estos aŭdata en ĵidioma angla lingvo; samtempe la angla lingvo de la Londonano estos transformita en la korean lingvon". La koro de la aparato konsistas el elektrona biblioteko de vortaroj el diversaj lingvoj, kiu ne estos pli granda ol kesteto por ŝuoj.

Teknokratismo kiel doktrino intruas, ke regno de tekniko povas solvi eĉ sociajn problemojn. Ekz., grandamase produktata sinteza nutraĵo forigos el la mondo malsaton, kune kun ĝiaj hom-sociaj streĉoj. Teknokrato, drogita de la teknika progreso de nia jarcento, profunde kredas, ke la tekniko estas ĉiopova.

Sed oni ne bezonas esti filologo por kompreni ke tiu maŝino suferos absolutan fiaskon. La Esp-istoj ne bezonas forlasi sian standardon pro superflueco de nia lingvo. Neniam

inter Londono kaj Koreo okazos simila telefonmiraklo; eĉ en la limoj de nia urbo du malsam-lingvanoj ne povos, por kompreni unu la alian, serĉi helpojn en telefonejo.

La koro de maŝino ja estas vortaroj, kiuj konsistas el vortoj. Al la maŝino do restas nur trovi ekvivalenton de la koresponda vorto. Ekz., jen tre simpla frazeto: "How do you do?" kaj la maŝino laŭvorte tradukos: kiel fari vi fari?" El la germana lingvo la sama frazo sonos: "Kiel iras tio?"; estone kaj finne: "Kiel marŝas la mano?"; latve: "Kiel al vi bone sterniĝas?" La respondo probable estos "How are you?"—"Kiel estas vi?" Tiu re-demanda formo sonos sen-takte en multaj aliaj lingvoj. La angla lingvo tiurilate estas honesta kaj ne ŝajnigas afekton aŭ intereson, ĉar plejparte estas nur formalajo. La daŭrigo povos esti: "Where do you speak from? Rainy day, what?"—tradukote: "Kie fari vi paroli de? Pluva tago, kio?"—kun respondo: "From London, cats and dogs here!"—tradukote: "De Londono, katoj kaj hundoj ĉi tie!" Viktimo de tiu "traduko" eble protestos: "But you are pulling my leg! What are you up to? sed la traduko: "Sed vi estas tiranta mia piedo! Kio estas vi sur al?" eble finos la konversacion abrupte.

Jam Esp-o estas liberala, fleksebla kaj tolerema lingvo (alkutimiginta al misuzo), sed eĉ Esp-isto estos naŭzata per tia lingva kaĉo. Evidente maŝino devas koni ne nur vortojn sed ankaŭ gramatikon por scipovi uzi almenaŭ la akuzativon kaj ĝustan vortordon en la frazoj; same koni la stilon kaj idiotismojn de la lingvo. Aliel rezultos ĉeno de distordoj, miskaj malkomprenoj, kiuj fortimigos simplulojn kaj skandalos erudiciulojn. Kaj se puristoj pro estetikaj kaŭzoj forjetas Pidgin kaj Basic English, kia estu alia sinteno nun . . . !?

Ankaŭ memoron la maŝino devas havi. Sen tio ĝi ne povos traduki la simplajn frazojn: "The teacher entered the room", kaj "The cook is in the kitchen". Ĉu instruisto aŭ instruistino? Kuiristo aŭ kuiristino? Pri tio la homa cerbo, dank'al memoro, rapide orientiĝas, sciante antaŭan tekston, konversacion aŭ situacion.

Fine, fantazon kaj bonan edukon la maŝino devas posedi. Se ne—"sugar daddy" restos nur sendaĝera sukerajo. "You are put on a quid"—ke vi sidas sur via mono (bedaŭrinde nur pundo) k.t.p. Kvankam la vorto "put" signifas "meti", tamen laŭ la granda vortaro de Muret-Saunders (angla-germana) ĝi povas havi ankoraŭ ĉ. 200 kromsignifojn, depende de la prepozicio: to put up—enloĝigi; to put up with—kontentigi; to put off—prokrasti. Aŭ depende de la okupo aŭ metio de la parolanto: to put a horse—dresi ĉevalon; to put into a port—fuĝi ŝipon en havenon. Kiel do la kompatinda maŝino povos orientigi en tiu labirinto?

Sajnas ke al ĝi restas nur: doni en kaj doni super (submetigi kaj rezigni).—A.F.

PRILINGVAĴOJ

Pro nefavora kritiko, supozinde reprezentanta iom ĝeneralan senton de legantoj, ni ne plu aperigos prilingvajn artikolojn kaj notojn, escepte se pro grava kaŭzo.

Ni klopodos aperigi, krom recenzoj, nur rankontojn, priskribajn artikolojn kaj ordinaran prozon de sufiĉe simpla esprimo-formo.

Gramatikemuloj avidantaj ankoraŭ pli da scio pri la lingvo povas sin turni al la Traduka Kurso, aŭ al La Progresanto, Admiralengracht 214, Amsterdam-W., bonega gazeto. Ambaŭ medioj fidiĝe servus al ilia celo. Mi havas materialon, kiu eventuale aperos en la nomita organo.—Red.

Lidija Ilieva, pri belarto—pentro, grafiko, skulpto. Aleksandro Petrunov, nur pri literaturo.—Str. Asen 1, N.55, Sova C., Bulgaria.

La Esp. grupo, Blumenau, Santa Catarina, Brazilo, petas uzitajn p.m. el landoj de la tuta mondo. Ili sendos brazilajn p.m. au p.k.

"En 'La Floroj de J'Malbono' oni ne trovas priseks-esprimojn tiel draste aŭdace nudsignifajn, kiel oni havas en iuj E-aj versverkoj de granda reklamo. Baudelaire ja uzis vortojn maldolĉe akrajn kaj morde hommalŝatajn . . . sed neniam esprimojn de

elaborita maldeco, de bruta krudo, de invito al la volupto"—Farbo.

WORLD CLIPPINGS.

CHINA.—Since 1953 Esp. had vegetated semi-legally, but in June, 1957, the Comm. Party of China proclaimed: "Let flower all the blooms of art! Free competition between rival schools of thought!" This attitude may favor Esp., which is now showing remarkable activity in this massive country.

HUNGARY.—An official 3-member delegation attends the World Esp. Congress in Marseille.

Two Esp. stamps are obtainable for 4 reply coupons at Lajos Marton, Bors 2/4, Budapest 12.

BULGARIA.—The Esp. stamp will have picture of town Tarnovo, with a portrait of Zamenhof.

State printery issues Esp.-Bulgarian dictionary, 8000 copies. It is printing also a textbook.

A correspondence course, with a sturdy fee, surprised sceptics by setting some 1000 folk learning Esp. The enterprise is considering issue of gram. discs with E. songs and text for these members. Not bad for a 7,000,000 landlet!

NEW ZEALAND. — Govt. issues new Esp. talkie, black and white, 15-min. Loaned through addresses in 7 lands.—"Esperanto" (June).

HOLLAND.—International Catholic Information Office, which replies in Esperanto, reports that to Jan. 1, 1957, it received 2,382 inquiries from 69 countries. In 1956, 58 came from beyond the so-called "curtain", and for the first time since War II there were inquiries (3) from the Soviet Union.

IRAN.—Abadan Esp. Society, 36 members, has become an associated group of the B.E.A.

POLAND.—The 44th World Congress of Esperanto will be in Warsaw —1959. Zamenhof: born 1859.

La Societo de Gefratoj, Bromdon, Bridgnorth, Shrops., Eng. (Bruderhofanoj), publishes a news-letter in Esperanto free to any interested. They would be glad to get letters in Esp-o for circulation among the Fellowship.

La Rondo

The Australian Esperanto Monthly

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Jarkotizo: 12½\$ (aŭ 20 respondikuponoj).

Anoncoj: Tri linioj: 4\$.



Redaktoro: F. R. BANHAM, 2 Banchory St., Essendon, W.5, Victoria.

Adreso de A.E.A.—Box 2122T, P.O., Elizabeth Street, Melbourne.

Kasisto: K. Linton, 11 Poplar Street, South Caulfield, S.E.8.

Vol. 11, N-ro 79.

MELBURNO.

Sept.-Okt., 1957.

ESPERANTO NEED FEAR NO RIVAL

By Elbert L. Wells, 87-year-old Pioneer in U.S.A.

(From "Amerika Esperantisto," May-June, 1955.)

I am never troubled or in doubt about the eventual triumph of Esperanto. Because of its absolute merit it is invincible, unbeatable, and it need fear no rival. The reason the world does not accept and adopt it is the same reason that it waited half a century to adopt, for instance, the known merits of the Diesel engine and for the same reason that the world is still waiting to set up a world government, as logical and vital a necessity as any other kind of government. Inertia, the reluctance of things standing still to get moving, is a physical fact.

Esperanto is a proven success, not an untried experiment. It is efficient, capable, and ready to fill a vital need. It is the world that lags—the world that procrastinates in the universal adoption of a common auxiliary tongue that would tremendously accelerate the world's upward progress in almost all its endeavors.

Besides its day to day convenience, Esperanto would make available, around the world, all knowledge and advancement so far made anywhere, and avoid repetition of research.

With respect to "day to day convenience," I am impressed with the urgent suggestion that, in the elimination of distance, and the resultant free flow of travel across national boundaries over a large part (alas! not all) of the world, Esperanto

should focus and concentrate on a very thorough Esperantization of the air-travel lingo of the day as used by the passenger in the airport and by the pilots and technicians in the hangar. Also, especially ready for an Esperanto wedge to be driven in, are the fields of international crime detection and of weather news.

My confidence in the superiority of Esperanto over any other auxiliary language that may be devised lies in the fact that in simplicity of basic structure it has gone ALL THE WAY, retaining at the same time such flexibility and grace of expression as make it a fit and worthy instrument of thought on a high level of culture and intensity of feeling.

Esperanto will be gradually improved from WITHIN, as the years pass; but guardedly—for stability is one of its assets. No better auxiliary language will be devised from the outside, nor will it be displaced by any national language now in use, because the national pride of the other nations would not permit—and because any existing national language would be many times more difficult to acquire, and only fractionally as fit, and a small fraction at that.

(Note:—In "International Aviation Review," Transifach 1434, Ber., April, 1957, there is an Esperanto

article on Esperanto in Aviation. From it we learn that the air lines are indeed awakening to the use of Esperanto in their field. The first line to adopt it as a medium was SAS, then followed KLM; for the 1955 Esp. Kongreso in Bologna prospectuses were issued in Esperanto by BEA/BOAC, KLM, Swissair; for that at Copenhagen, 1956, BEA/BOAC, SAS and Swissair published brochures in Esperanto. The latter was especially attractive and detailed. For that at Marseille, 1957, Air-France followed suit.

The German Railway Federation issues Esperanto prospectuses and prints timetables in that language. The Swiss Lotschberg rail system in 1955 saw its 16p. brochure rapidly exhausted and has just published another. Tourist folders in Esperanto are legion.

(“Nederlanda Esperantisto”, June, 1957.)

VERSOJ POR VEANTOJ.

Iuj plendas pri enhavo
de l'organo nia “Rondo”
Tiel estis, ne sen pravo,
jam de l'tag' de ĝia fondo.

Ĝi en tio ne unikas,
ricevante vortajn batojn;
tre-pli bonan ni kritikis—
certe ne dirante flatojn!

Al legantoj nekontentaj,
lamentante elokventaj,
jen komentoj komplimentaj:—
—En ĉiu plendanto vegetas talento,
latenta, silenta pro maldiligento:
ĝin veku el ĝia tro longa dor-
maĉo,
kaj “Rondon” plenigu laŭ ĉies
gust-plaĉo!

MIA KRONO.

Ne sur la kapo mia restas
la krono mia, sed en la koro
ĝi troviĝas. Ĝi ne estas
el Hindaj gemoj, brilimpona oro.

Ĝi estas nevidebla: ĝia nomo
Kontento estas; al la simpla homo
ĝi pli volonte venas. Nur escepte
ricevas ĝin la reĝoj ĝoj-akcepte.

—F.R.B. (laŭ 3 Henry 6, Akto 3,
sc. 1).

Australia Kroniko

● **SYDNEY:** Dum la aŭgusta amuz-vespero s-ano Rutland, kiu revenis el Eŭropo antaŭ nelonge, parolis en la angla lingvo pri sia vojaĝo al Eŭropo. Alia mondvojaĝanto, f-no Macey, rakontis al ni, 15.8., pri vizito al diversaj Eŭropaj E-kluboĵoj. Nia jugoslava amiko, s-ano Milan Sudec, voĉlegis parton de novelo, “Morto de la needziginto” de Arthur Schnitzler, kiun li mem tradukis (22.8.). S-ano J. Matasin (5.9) parolis pri siaj vojaĝoj al aliaj landoj kaj f-ino Smith (12.9) pri la historio de la E-movado de Sydney. Dum la septembra amuz-vespero ne-E-isto s-ro Laurie Booth prelegis en la angla lingvo, kun belaj lumbildoj, pri sia vojaĝo tra Eŭropo.—VOLO.

● **MELBOURNE:** Dutagan ekskurson al la neĝregionoj de montoj Hotham kaj Buffalo priskribis s-ano Fay Koppel je 21.8. S-ro Burstin, 28.8, daŭrigis sian prelegon pri la skolo de la psikologo Alfred Adler. Interesan vesperon provizis je 4.9. s-ano Ken Linton. Li ne nur daŭrigis sian serion da prelegoj pri gramatikaj malfacilaĵoj, sed krome raportis pri kaptado kaj “melkado” de la danĝeraj Taipan-serpentoj, laŭ raportoj ricevita de lia filino, kiu nun loĝas en Nov-Gvineo. Tre malofta parolanto, s-ano J. Oki, prezentis interesajn lumbildojn, 11.9., pri japana arto, nomata Ksilografio, kaj ankaŭ montris originalajn bildojn de japanaj artistoj. Ges-roj Milligan (18/9) prezentis varian programon. Unue, s-no Milligan, legis elĉerpaĵojn el leteroj de la novzelanda E-isto s-ro King, kiu ĵus travagis Eŭropon kaj ankaŭ vizitis la Universalan Kongreson en Marseille, kie li ankaŭ rekontis la nepon de la Majstro. Per granda mapo, s-ro Milligan klarigis la vojon de s-ano King tra Eŭropo. Poste, s-ro Milligan prezentis sur sonbendo interesan programon pri la multvariaĵoj kiujn imitas la aŭstralia “lira birdo” Menuro. Ci-tiun registritan programon li speciale preparis por skoltaj esperantistoj en diversaj landoj.—H.K.

● **CANBERRA:** Neatendita, sed tre bonvena vizitanto dum Aŭgusto estis nia fondinto s-ano Ralph Harry, kiu alflugis el Singaporo, kie li deĵoras

kiel aŭstralia komisiito. Li povis ĉeesti dum 2 vesperoj kaj li rakontis al ni pri la singapora E-klubo, kiun li fondis. Li ankaŭ montris al ni oficialan publikacion en E-o pri Singaporo. Ni ĉiuj esperas revidi lin ĉe la 11a Aŭstralia E-Kongreso en Melburno.

● **PERTH:** La liganoj ricevis tre belan poŝtkarton el Singapore de nia pasinta prezidanto, S-ro Jack Hawkes (rep. de AEA ĉe la Kongreso en Marseille). Ĝi trafe emfazis la fakton, ke li vere estas aliande.

11 Aprilo ni tre ĝuis paroladon de nia vicprezidanto, S-no Ruth McGrath, pri spertoj kaj malfaciloj, kiujn Pastro John Wollaston renkontis dum la fruaj tagoj de la kolonio ĉe Bunbury kaj Busselton.

En la maja kunveno liganoj legis en E-o teatraĵetojn—plezura vespero por ĉiuj. Tiu metodo, per kiu ĉiuj anoj partoprenas en la aferoj de la kunveno, ne estas sufiĉe uzata.

GIVE BOOKS FOR CHRISTMAS.

To your local or public lending library give a copy of "Life of Zamenhof" by Dr. Privat (English Edition), cloth bound.

Order your Esperanto-Books from your nearest A.E.A. Book-Agent:

Victoria and Tasmania: Mrs. O. Glenie, 90 Williams St., St. Kilda, Vic.

South Australia: Miss W. Addis, 25 Greville Ave., Flinders Park, S.A.

Western Australia: Miss E. Chandler, 5 Todd Ave., Como, W.A.

Canberra: Mr. S. Fulop, 26 Bundeela St., Narrabundah, Canberra. N.S.W.: Miss F. Smith, 50 Fitzroy St., Milson's Point, N.S.W.

Queensland to our Chief Book Agent: Mr. G. A. Grant, 6 Mikado St., Hamilton, Brisbane, who will also order from overseas any special books not in stock at State Agents.

KLUBAJ ADRESOJ.

Sydney E-Societo: kunvenas ĉiujlande je la 8a ĉe 12 Ennis Rd., Milson's Point (stacidomo). Sek-io: f-ino Edna Dash, 26 Edgeware Rd., Enmore, NSW.

Melbourne E-Klubo: kunvenas ĉiunmerkrede je la 8a ĉe "Henry George" Club Rooms, 18 George Parade (for de 113 Collins St.),

Melbourne. Sek-io: s-ro H. M. Cohen, 83 Youngman St., Preston, N.18.

Okcident-Aŭstralia E-Ligo kunvenas ĉiun 2-an kaj 4-an jaŭdon en monato en ĉambro 6 ĉe 196 Adelaide Terrace, Perth. Prez.: s-ino G. Pollard, 45 Second Ave., Riverton, W.A.

Brisbane E-Societo kunvenas ĉiun 2-an kaj 4-an lundon je la 8a ĉe Martin Chambers, George St. (apud Roma St. Stacidomo). Prez.: s-ro S. L. Parry, Ford St., Albion, N.2, Brisbane.

Canberra E-Klubo: Sek-io: s-ro N. Gamble, 27 Froggatt St., Canberra.

Hobart E-Grupo: Sek-io: s-ro Geo. E. Lancaster, The Friends' School, 393 Argyle St., Hobart, Tas.

En **Adelaide** ne ekzistas organizita klubo, sed informojn pri neregulaj kunvenoj donas s-ro Harold W. Fidge, 46 Maesbury St., Kensington, S.A. Tel. FA 7536.

En **Albany, W.A.**, ekzistas laŭ oni-diroj malgranda E-grupo, sed ĝi neniam kontaktis la A.E.A. Centron. (Ni bonvenigus detalojn pri kunvenoj, funkciuloj, k.t.p.)

11-A AŬSTRALIA E-KONGRESO.

Aliĝojn sendu al Box 2122T, Elizabeth St., Melbourne. Dato: 2-8a Jan. 1958. Kotizoj: A.E.A. membroj 30/-, ne-membroj de A.E.A. 35/-. Subtenantoj laŭ libervolaj donacoj.

3-a Listo de Aliĝintoj:

73. s-ro S. Grant, Port Lincoln, S.A.

74. s-ro I. Jones, Port Lincoln, S.A.

75. f-ino C. Macey, Sydney

76. f-ino D. Foxlow, Sydney

77. s-ro A. Feldmayr, Sydney

78. f-ino Joy Feldmayr, Sydney

79. f-ino June Feldmayr, Sydney

Tibor Sekelj vizitos nian kongreson.

Ni ĝoje povas raporti ke la konata Esperantisto, verkisto kaj mondmi-granto s-ano Tibor Sekelj, en leteroj al nia sekretario, s-ro Koppel, promesis ke li partoprenos nian kongreson. En la nuna momento nia konata s-ano estas en Katmandu en la Himalaja Montaro, kie li verkas libron pri Nepalo. Kondiĉe ke li povos plenumi ĉi-tiun taskon en bona tempo, li venos al Melburno. Li prelegos, kun lumbildoj, pri jenaj temoj:

Kolorplena Vojaĝo tra Centra
Ameriko

Tra Azio sen Magia Tapiŝo
Nepalo, himalaja lando.

S-ano Tibor Sekelj ĝis nun verkis 12 librojn, kiuj estis eldonitaj en 18 diversaj lingvoj. Lia vizito al Aŭstralio estos certe granda propagando por Esperanto. Dum sia restado en Melburno, s-ano Sekelj restos kiel gasto en la domo de ges-roj Koppel. S-anoj kiuj deziras viziton de nia konata s-ano post la kongreso kaj kiuj estas pretaj gastigi lin, kontaktu A.E.A. por arangi tian viziton.

ESPERANTO, AID TO FOREIGN LANGUAGE LEARNING.

A headmaster, a teacher of French, writes: ". . . I know I have often argued from a purely psychological point of view that to give a child a sense of positive achievement in language learning—and that quickly—together with an insight into the sort of discipline which language requires, in a simplified form, would be worth a preliminary year on Esperanto before turning to French, etc. My purely personal opinion on language teaching in schools is that an unbelievable and quite scandalous number of child-hours are thereby wasted for very little return; the number of children who achieve something linguistically worth while, or culturally worth while, being out of all proportion to those who, after five or more years of study, cannot manage, a year later to say where the traditional aunt has left her ubiquitous pen. If the preliminary teaching of Esperanto can help to redress this balance a little, it will have achieved something almost as valuable as its primary objective. . . ." (Bulletin of the N.Z.E.A., July, 1956.)

LANDNOMOJ.

Skribantoj en E-o, hezitante pri formo de landnomo, aŭ facilanime elektante propran konjektadon, saĝe sin turnus al la jarlibro de U.E.A., por ricevi apogon de la aŭtoritato. Ni havas en penso ekzemple: Israelo, Malajujo, Maltujo—neĝustaj! Malzorga misuzado ricevas bremson, se **tiaj** homoj uzus iom da komuna prudento.

Recenzoj

"LA ŜENPERA VERBIGO DE ADJEKTIVOJ", de H. A. de Hoog. Druivenstraat 32, The Hague, Holland. Prezo 0.60 fr. (?).

Ĉe la Harlema Kongreso s-ro Isbrucker avertis kontraŭ la senpera verbigo de adjektivoj. Ekz., "li pravas; tio sufiĉas; mi pretas (anstat. li estas prava k.c.). Prof-o W. J. Downes, L.A., substrekas tiun sintenon de s-ro I., kaj en artikoloj en "La Progresanto" pritraktis la tutan demandon, rimarkante, inter alio, ke ĉe la verbigo de A-, kaj ankaŭ O-vortoj, la -i en la rezultaj formoj (ekz. sufiĉi, reĝi) prenas signifon de ageco, aktiveco, impreseco: agi, impresi kiel reĝo.

De Hoog, kritikante la supron, pacience, detale kaj atentotire esploras la malfacilan komplekson de problemoj, kiuj karakterizas tian ĝisfundan reserĉon, kaj ellaboras skemon per kiu observaj legantoj povas interpreti al si la aferon en sufiĉe klara lumo. La aŭtoro estas tolerema, larĝvida homo, kiu ne volas tro bremsi ŝajne naturan evoluformon de Esp-o, sed prave rimarkas, ke multaj vortoj, ekz. utili, nesti, serpenti, almozi povas havi ankaŭ ideojn ambaŭ de stato kaj ago. Nesti povas signifi aŭ: fari neston, aŭ: logi en nesto. Almozi, ĉu tie la -i signifas nur "peti"? Utili: esti aŭ efiki . . . ? Kuraĝi: havi Kuraĝon, aŭ esti kuraĝa? Oni ne povas diferencigi unu de la alia; tial ni ne estu tro rigoraj ĉe la principo-formulado.

La aŭtoro, p. 30, diras, ke oni ne povas uzi "La vizitanto noktis," sed sur p. 26 citas je Rut 1: 16, "Vi . . . mi noktos". Ni aldonas: noktoestu, Lev. 19/13; tranoktis, Jos. 6/11; noktu, Neh. 4/22; noktadis, 1 Kron. 9/27. Li finas sian studon per triparagrata admono, en kiu li saĝe konsilas pri konscia kaj modera uzado en fenomeno pli komplika ol ĝi unuavide aperas.

Li resumas la pledon de Downes forme de ses tezoj, sed ne klare indikas, kie li komencas ekzameni la sesan.

Ni forte petas, ke eldonistoj indiku per steloj (monunuo) la koston de siaj verkoj. 0.60 fr. signifas por ni simple—enigmon! Stelo—7½ p. en

Aŭstralia mono. Ni krome rimarkas, ke unu stelo egalas unu respond-kuponon, kiu tamen kostas ĉe ni almenaŭ unu ŝilingon.

Valora kontribuo al nia fakliteraturo. Ĉiu esploranto en la profundan genion de E-o sentus plezuron, ekzercante, per ĝiaj paĝoj, sian mensan gimnastikon.

LA FLOROJ DE L'MALBONO: Charles Baudelaire. Kompleta kolekto redaktita de G. Waringhien kaj K. Kalocsay Eld. Stafeto, J. Regulo Perez, La Laguna (Tenerife), Canary Islands. 400 paĝoj, usonaj dol. 2.40 aŭ egalvaloro.

Pri Baudelaire la literato ne pensas sen tio, ke lia spirito turniĝas vid-alvide al du liaj similuloj—Heine kaj Poe. La trio vivis en fantomeca sfero en kiu ombre dancis la hororo kaj milde logis la idealo-belo en altoj nealireblaj.

Iliaj kontribuoj al la sumo de l' akiro homa? Heine—la perfekta liriko, fasko da neimitebla prozo, vivo de liberiganto de l'penso. Poe—majstra esploro en la misteron de l'psiko, genia novelkonstruo, kaj kelkaj poemoj. kies songeca senco kaj morna ritmo eterne nin hantos. Baudelaire—radika influo sur la modernan poezion; virtuozeza manipulo de metrikaj rimedoj, kies efiko ravas ĉiun, kiu perceptas, kiel mirakle li donis formon al sia maldolĉa sopiro al la belo, perfekte kaj ideale.

En pluraj rilatoj la elementoj nomitaj estas pli-malpli komunaj por la tri homoj: ni atribuas kvalitojn laŭ tio, kiel ili ŝajnas pli nature aplikigi, ĉar aparte kaj propre evidentaj por tiuj personoj.

Ke la tri poetoj venis al simila vivfino — korpe, mense diserigintaj — povas esti strange hazarda samsortigo, aŭ simple triobla fenomeno komprenebla pro la efikado de psikologiaj leĝoj. Ĉu estas permesate al mortemuloj iri sendanĝere nur ĝis certa punkto, esplorante nenomeblojn, sed, pasinte ĝin, ili ricevu mortajn vundojn? Ikaro flugis tro proksime al la suno, kaj falis detruite. Ĉu nia trio tro apudis la flamojn de l'infero? Ni pensas ankaŭ pri De Maupassant, Wilde kaj la dekadenculoj. Nestas io mortiga en ilia malsaneca metio.

Nia tasko ne estas taksu la karakteron de Baudelaire. Pri la kvalitoj de la originala verko Franclingvanoj havu la aferon. La redaktintoj zorge klarigis la plan-formon de sia kompilo kaj la principojn laŭ kiuj oni tradukis tiun unikan kolekton. La tradukintoj estas Roger Bernard, Magda Carlsson, Hilda Dresen, Kalman Kalocsay, Lajos Tarkony, Henri Vatre kaj Gaston Waringhien. La sencon de la tuto kontrolis Waringhien; la formon Kalocsay. Tiu aranĝo rezultigis juvelan verkon, kiu ravos artismajn elitojn kaj restos por konvenciumuloj kvazaŭ Psalmlibro de l' Perverso.

Ekzistas tamen homoj nek artelitaj, nek konvenciaj. Tiaj ne vane kaj absurde serĉos moralan edifon en ordinara senco, sed penas tiri sanajn lecionojn el la vivo kaj verko de kunanimo torturita de la propra temperamento ĝis lia inkandeska genio eksplodis en kreaĵoj, kies terura atesto daŭre sorĉos la mondon.

Ni rekomendas la libron al ĉiu kapabla eniri—ĉu estetike, ĉu psikologie—ĝian strangan etoson, konservante al si la spiriton de pura artfrandulo aŭ esploranto en la tenebrajn labirintojn de la menso. En ĝi ni vidas dek-dujaran ellaboritaĵon fare de konsciencaj kulturamantoj kaj la unuan kompletan kolekton de ĉefranga poeto.

Ĉiuj kontrolita forme kaj sence, ĝi meritas konsulton de tradukintoj de Baudelaire en naciajn lingvojn.

Diademo de l'doloro, memfarita de martiro, kiu pasis de la profano en la piecon—de Satano al la Savanto.

HOMOJ KAJ RIVEROJ: J. H. Rosbach. Eld. KOKO, Randbolvej 4, Copenhagen F. 140 p. 12 Danaj Kr. (kio da steloj?).

Prave la aŭtoro ne donis al siaj verketajoj la kolektivon nomon de "noveloj", sed ĝuste rakontoj. Ili konsistas el scenpriskriboj, skizoj, meditaj kaj pluraj efektivaj noveletoj.

Ĉi atesto pri pluma talento denove substrekas la bezonon por revizio de la jam de longe malaktualiĝinta Enciklopedio de Esp-o, en kiu ne troviĝas la nomoj de multaj merituloj, inter ili nia aŭtoro Rosbach kaj lia amiko Poul Thorsen. Rosbach, el longa kaj distinga konanteco kun Esp-o, prezentas prozon de facile le-

gata speco. Tie kaj tie tamen lia funda familiaro kun Esp-o tentas lin al esprimliberoj, kiuj postulas heziton ĉe legantoj. Sed entute la kompilo estas valora kontribuo al la idea konsisto de nia populara literaturo.

"Gazelaj Kruroj" mokas volupteman butikiston, kiu facile donacas paron da ŝuoj al bela dungitino, sed avarulas kontraŭ mizera homaĉo petanta pri rebato.

"Cigna Kanto" havas valoron en tio, ke ĝi prezentas intiman dialogon inter malsanuloj. Temas pri la eŭtanazio.

"Karoto" utiligas la iom tro ofte uzatan temon de vagulo, kiu krimetas por ricevi la relativan komforton de polica ĉelo.

"Riveroj" malkovras la malfortan moralon de virino dum la teroro germana.

"Perdita Diamanto" amuze rakontas pri juvelisto embarasita per propra preztakso.

"Bravulino": Kiel terure povis agi senprincipa Norvegino serve al la germana malamiko. Sordida studo pri la planita perverso.

Jen nur kelkaj el frandinda fasko de bone esprimitaj vivspertoj kaj observoj. La libro finiĝas per maturensa medito pri la muziko kaj ĝiaj efikoj sur la fantazion.

Iniciacao No Esperanto, gramatiko, ekzercoj kaj vortareto, de I. G. Braga.

Curso Practico de Esperanto. Tria eldono (20,000 ekz.): Portugale trad. de I. G. Braga laŭ la konata lernolibro de Szilagy. Eldonis ĝin la propra kooperativo E-a en Av. 12 de Maio, 47, Sobreloja H-208, Rio de Janeiro, Brazil. Ili bone servas al homoj sciantaj la Portugalan.

Sonetkrono por la E-istaro: S. S. Petrovič, Eld. Serbia E-Ligo, Terazije 42, Beograd, J. S. Lerta versmanipulo en tio, ke ĉiuj linioj komenĉigas per literoj kune formantaj frazon. Povas esti, ke tiu artifiko petole perdis al la aŭtoro iom da libero esprimi sin ankoraŭ pli klare.

Halto al la Atomismo. J. Pignero. 16 p. 2 rkp. ĉe SAT, 67 Av. Gambetta, Paris 20. Brula pensado pri la universala minaco, kiu superombras ĉian politikon.—F.R.B.

HOMERO DORMETAS!

En "Versaĵoj en Prozo" Kabe (p. 37) skribis: navigis nia ŝipo. Por ke ĝi eblu fari tion, necesas verbo "navi"! P. 57: pianino! P: 51: ambaŭ hirtis la plumojn. En "Faraono" vol. 3, 134: nido (nesto!); vol. 2, 110: tuko de . . akvo (Fr. nappe d'eau); 127: tombus (falus!) sur nin armeoj.

Kolego R. Leger en "Franca E-isto" informas, ke Prof. Waringhien "subtenas per praktikaj kololarioj..." Vane fosadinte inter listoj de neologismoj, ni ankoraŭ gratas la kapon. Ĉu ĝi rilatas al la Angla "corollaries"?

Prof. Waringhien mem rimarkigis al ni (pri paĝo 155 La Rondo), ke li ne konscie skribis: "Por tio, oni neniel bezonas eliri el liceo aŭ universitato", kaj sendis korektige la ĝustan: "Por tio, nenia bezono, ke oni estu elirinta el liceo. . . ."

Ni bone komprenas, amiko. Vi urĝe skribis, kiel ĉiu sindonema, trookupata E-verkemulo, per "kuranta plumo"—ilo honora, sed ne ĉiam perfekte fidela al la korekta esprimado, forma aŭ senca.

TONAKCENTADO.

Tonakcentado estas voĉa levo aŭ mallevo de sonoj eldirataj de parolanto. Klara esprimado de senco en la parolo estas preskaŭ ĉiam tute produktata de tonakcentado, kaj estas neniam rimedo per kiu ni povas indiki tion sur skribata paĝo. Anglo povus studi la kompletan gramatikon kaj ĉiujn prononcregulojn de fremda lingvo, neniel suspektante, ke ĝia tonakcentado diferencas de la Angla. Li povas plene posedi la gramatikon kaj prononcon de fremda lingvo; tamen, natura uzanto de tiu lingvo ne povas facile kompreni eĉ simplan frazon parolatan kun Angla tonakcentado. Rimarku, E-isto lernanta la Anglan:

I beg your pardon—Mi petas vian pardonon.

I beg your pardon?—Pardonu: mi ne bone aŭdis vian diron.

I beg YOUR pardon!—Ĉu vi kredas konvena, ke ĝuste mi devas vian pardonon peti!

Estas certe, ke Angle-parolantaj E-istoj tonakcentas laŭangle; ŝajnas, ke iuj Europaj lingvoj estas akcentataj (tre) simile al la Angla. Tamen, estas dubo, ke tio validus ankaŭ por Orientaj kaj aliaj ne-Eŭropaj lingvoj. Ni atendas opiniojn de Aziaj amikoj.

MAJSTROJ PAROLAS.

Neniam kontraŭbatalis la Majstroj, sed nur fanatikaj anoj. Schleyer, la aŭtoro de Volapuk, en letero al amiko:—

"Mi volis akceptigi ne mian Volapuk, sed tute ĝenerale la ideon de mondlingvo. Se iam pereos mia sistemo, ĝiaj anoj aliĝu al sistemo pli bona aŭ sukcesa!"

Zamenhof (Orig. Verkaro, 262):—"Elmontru al mi, ke la vojo, sur kiun vi vin jetis . . . povas alkonduki nin al la celo,—kaj mi la unua jetos mian laboron kaj aliĝos al vi. Se mi povus kredi, ke Volapuk havas eĉ la plej malgrandan eblon fariĝi iam lingvo de la mondo, mi neniam elpaŝus kun nova sistemo nur tial, ke ĝi estas en miaj okuloj pli bona; per mia tuta animo mi aliĝus al Volapuk . . . por la sankta unuanimeco, mi kun granda plezuro forjetus mian laboron kaj aliĝus al Volapuk, se mi povus kredi, ke Volapuk, en ĝia nuna formo aŭ en formo plibonigita, havas eĉ la plej malgrandan eblon atingi la celon".

ĤHOJ AŬGURAJ.

"Teruran malvenkon de sia lando Sir Montagu Norman ja vidus certe en la eventualo, ke la de li protektita Tria Regno en iu ajn formo kunlaborus kun Sovetio".—"Kritika Observanto", Aprilo 1939, red. de Lanti.

"Hitler verŝajne pripensas pri la ebleco de kontraŭokcidenta politiko, eble subtenita per ia neataktaĵo kun Sovetio—post kiam li havos ĉion, kion li povas per brita helpo." (same, Okt-o, 1939.)

"Nek en Ĉinio, nek en Hispanio, Sovetio decidige intervenis . . . sed, kiu atakas ĝin en la **propra** lando, tiu verŝajne mordus graniton." (same, Jan. 1939.)

ZAMENHOF - FESTO
en Melburno okazos, sabate,
14 Dec. je la 7.45 vespere
ĉe "Caris Club Rooms",
343 Lit. Collins St.
(McEwan House)

Fest-Parolado: s-ro F. R. Banham

En 18,000 estas nova Pollingva gazeto propaganda — "Esperanto — Lingvo Internacia". Ĝi estas grandformata, ilustrita kaj tre riĉenhava. Ars Polona, Foksal 18, Warsaw.

SIMPLIGITA ANATOMIO.

Ĉapelo: kapkovrilo, salutaparato.

Buŝo: manĝotruo, kiun kadras du Lipoj: manĝotru-randoj, aŭ, ĉe la belulinoj—kiskusenoj.

Haroj: kapfadenoj, aŭ pedikarbaro.

Oreloj: kapfolioj, aŭ aŭdiloj. Ĉe la lernbuboj, pinĉkarno. Ili ankaŭ servas, por malhelpi, ke la salutaparato kovru la tutan kapon.

Kolo: kravattubo, kanalo inter la manĝotruo kaj la digestujo.

Kruroj: irstangoj, plilongigo de la sidkarno.

—Lau Raymond Schwartz.

PIPRAJ PAROLOJ.

"Ĉu oni jam ne regalos nin per libro pritraktanta la tezon: Stilo Estas Homo, citante le E-ajn verkistojn kaj iliajn stilekzemplojn el la vasta E-a literaturo?" — T.M. en Oomoto. Ni turnas njan sam-on al "International Language" (Sept. 1927), kie li trovos lerte burleskajn modelojn de Forge, Luyken, Schwartz.

"La intima slava influo en la strukturo de E-o restas preskaŭ nekonata, pro la fakto, ke okcidenteŭropaj eminentuloj ne scias slavajn lingvojn . . . La korelativa tabelo devenas ne el la greka, sed el la slava."—P. Stojan.

"The adverbial participle is an elegant form of expression and its free and correct use stamps the expert."—Mason Stuttard.

"If one of a pair of 'balanced clauses' has -US, then the other must be the same."—(same).

AGO ORA.

Mil Germanaj geknaboj dum toranta pluvo vizitis la mastombojn ĉe Belsen por tie meti florkronojn sur la ripozlokojn de la viktimoj. La viziton inspiris prezento de la teatraĵo La Taglibro de Anne Frank, kiun verkis 14-jaraĝa Juda knabino, kiu pereis en Belsen.

La nova generacio portas en si esperon por la estonteco; la malnova estas korupta, venenita de fiambicio kaj sofismaĉaj pensprocedoj.

—"Jewish News," 22.3.57.

Invitoj de Varsovio kaj Barcelono por respektive la Universal Kongresoj de 1959 kaj 1960 akceptitaj, sed nur prinĉipe.

"PEOPLE'S CHINA."

Aprilo 16 enhavas plenpaĝan skizon pri E-o en Cinujo de post 1906 sub titolo "Boom in Esperanto" (entuziasmo pri . . .). La aŭtoro menciis "Popola Mondo" kaj "El Popola Ĉinio" (Foreign Languages Press: Pekingo) sed bedaŭrinde ne donis plenan, utilan informon pri tiuj gazetoj. Tiu cetere bona artikolo ankoraŭ pli plaĉus, se ĝi jetus lumon sur la ideologian evoluigadon de la registaro, kiom koncernas nian aferon.

—Red.

UNIVERSALA ESPERANTO ASOCIO.

Kiel ĉefdelegito en Aŭstralio mi fieras anonci, ke Aŭstralio gajnis la unuan lokon en la dua parto de la Internacia Konkurso ("Esp-o", Julio). La Aŭgusta n-ro anoncis plifirmigon de tiu unua loko, do ni esperas teni tiun envidian pozicion ĝis la jarfino. Tio estas precipe ĝojiga, pro tio, ke antaŭ du jaroj ni estis preskaŭ la lasta.

La kotizoj de U.E.A. plialtiĝis: nune, MJ 15/9, MA 31/6, MS 47/3, SA 23/6. Bv. frue pagi.

—Ken G. Linton.

En 5 jaroj la membronombro de UEA kreskis de 14,943 ĝis 28,181 (fine de 1956).

Dum Oktobro la redaktoro feruis. Tial pardonu ian prokraston.

Ni penas eldoni n-ron por apero meze de Decembro.

Subtenu nian rubrikon—Libera Forumo. Ĝi estas ĝuste por vi. Surpaperigu viajn pensojn, plendojn, ideojn—kion ajn rilatas al nia kumuna afero.

U.E.A. KAJ E.A.N.A.

"Pro kalumnia agado kontraŭ la U.E.A. kaj la E-movado ĝenerale", fare de iuj individuoj ĉirkaŭ la Amerika E-isto", la U.E.A. eksigis G. A. Connor kaj atentigas siajn ĉefdelegitojn kaj perantojn, ke ili ne povos peri abonon al tiu gazeto.

D-ro W. Solzbacher, nome de la Esp. Asocio de Nord-Ameriko, protestis kontraŭ tiu bojkoto kaj dissendis deklaron, serĉante subskribojn subtene por sia protesto.

Iuj opinias, ke la agon de la U.E.A. kaŭzis lia detale kaj draste kritika artikolo malfavora al la verko de D-ro I. Lapenna, "La Internacia Lingvo". Ĝi aperis en "Amerika E-isto", kaj estas pacience kompilita komentario pri la konata libro. D-ro Lapenna rajtas rebati la asertojn kaj konkludojn de sia kritikinto.

Tamen la bedaŭrinda disputo similas flankprodukton de la malvarma milito, kiu propre ne rajtas havi influon sur nian politike neŭtralan movadon. Estas elementoj en la afero aliaj ol la pure literaturaj aŭ verkprestigaĵoj.

Certe estas, ke bojkoto sur literature-kritika grundo estas afero grava kaj pridiskutenda. Ni irus retroen al la tempo de la Ido-krizo por trovi precedencan.

La gazeto de la E.A.N.A. estas bibliografie tre valora. Ni ne konas similan, kiu havus rajton kompariĝi kun ĝi. Neniu serioza studento de nia movado, en ĝiaj historiaj kaj ankaŭ en ĝiaj aktualecaj aspektoj, volonte senigus sin je tiu revuo; kaj certe la bojkoto forte embarasos tiajn homojn.

Ĉu ne eblas kompromisoj de ambaŭ partioj? Modifo de la ideologia tono de la gazeto, kun rekompensa nuligo de la dekreto de U.E.A., povus fari finon al tiu dolora disputo.

Estas certe, ke la entuta pezo de la aranejoj sur la tero estas pli granda ol la pezo de homoj sur ĝi. (F. Nossal, SUN, Melb. 25 Junio 1956.)

Kio estas pli granda: du mil milionoj, aŭ dudek milionoj da miloj?

Parigu du muŝojn, donu al ili kaj ilia idarego protekton, kaj en malpli ol 4 monatoj ilia id-armeego nombrus je bilionoj-sufiĉe da muŝoj por kovri la teron per tavolo dikta kvindek futojn.